EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo
Redakcio kaj Administracio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio

VOL. 1 N-RO 2
JUN. 1950

人民中國報導

EN TIU ĈI NUMERO:

La Popola Armeo en Produktado

Ŝanhajo en Transformiĝo

Laboristo-Fabrikestro Liu Jengjuan

Esperanto en Ĉinio

Tri Senrivalaj Bravuloj

Ĉina Popolo Sur Paca Fronto

La alvoko de porpaca subskribo farita de la Konstanta Komitato de Mondpaca Kongreso en Stokholmo estas varme akceptita kaj grandskale disvolviĝanta en Popola Ĉinio. Ĉar en lasta jarcento la ĉina popolo per siaj propraj spertoj ja bone komprenas kion signifas la milito kaj nun ankaŭ kion la paco. Tial sciiĝinte pri la alvoko ili tuj entuziasme mobiliziĝas por esprimi la profundan malamon al milito kaj decidemon rebati ĉiajn tiajn klopodojn entreprenatajn de la militfabrikantoj.

Je la 14-a de majo okazis granda kunveno en la ĉefurbo de Ĉinio por vastigi la movadon subskribi sur stokholma pacalvoko. Pli ol 6,000 delegitoj, reprezentantaj du milionojn da loĝantoj en Pekino, kiuj ĉeestis la kunvenon, esprimis sian unuanimanan subtenon per subskribo de siaj nomoj sur la alvoko.

En sia malferma parolado, Kuo Mo-ĵo, prezidanto de la Komitato de Ĉina Kongress de la Defendantoj de Mondpaco, diris: "Ne estas timindaj la atombomboj kaj la hidrogenbomboj, estas grandioza nur la kreskanta forto de la popolo..... Se la imperialistoj kuraĝos komenci trian mondmiliton, ili preparos por si la kremacion."

La fame konata poeto Emi Siao, ĉina delegito al la tria sesio de la Konstanta Komitato de la Mondpaca Kongreso faris mallongan revuon de la paca movado tra la mondo. Tondra aplaŭdo aŭdiĝis, kiam li kriegis, "Ni varme salutas la heroan batalanton por mondpaco—Profesoro Joliet Curie."

Delegitoj de laboristoj, kamparanoj, popol-armeanoj, virinoj, studentoj, sciencistoj kaj religiuloj, kiuj suriris la estradon, ĉiuj voĉigis la postulon por la senkondiĉa malpermeso de atomaj armilioj, opozicion al la instigo de nova milito, decidemon por la defendo de daŭra mondpaco kaj unueco kun la pacamaj popoloj tra la mondo.

Ili esprimis sian konfidon en la gvidado de Prezidanto Maŭ Ze-tung kaj la Ĉina Komunista Partio, en la nevenkebleco de la remparo por mondpaco—Sovetio, gvidata de la granda Stalin, kaj en la forto de la mondpaca tendaro.

Ili ĵuris duobligi siajn penojn por alporti la fruan liberigon de tuta Ĉinio kaj konstrui ĉiam plifortan patrolandon, ĉar ili komprenis, ke tio estas la plej valora kontribuo kiun ili povas fari al mondpaco.

Pli ol 20,000 subskriboj estas jam kolektitaj ĉe la strata subskribstacio de la Popola Tagĵurnalo en Vangfuĉing-strato, kaj ĉi tiu estas nur unu el la strataj stacioj en diversaj partoj de Pekino. Krome, subskribfolioj cirkulas en ĉiuj fabrikoj, lernejoj, registaraj oficejoj kaj popolaj organizoj.

Fervoj-laboristoj kaj oficistoj kovris 10-metrolongan pecon de skarlata silko per siaj nomoj. Preskaŭ ĉiuj laboristoj en la Nova Pekina Presejo subskribis, kaj respondoj pri 100% subskriboj venas de kelkaj fabrikoj.

Subskribantoj estas diversaj kiel la loĝantoj en Pekino. Laboristoj irantaj al aŭ de laborejo, soldatoj, pedalĉaristoj, kolportistoj, kiuj demetas siajn varojn dum kelkaj momentoj, maljunuloj kaj junaj patrinoj portantaj siajn infanojn.

En Pekino la Popola Tagĵuralo kaj Kvangming (Lumo)-Tagĵurnalo vaste disdonis ekzemplerojn de la alvoko al la legantoj kaj en iliajn administrejojn amase venas ĉiutage la subskribantoj. kaj grandkvante alfluĝadas subskriboj poŝtsenditaj el malgrandaj urboj kaj vilaĝoj. La nombro ricevita sole de Popola Tagĵurnalo ĝis la fino de la majo atingis jam 240,250.

Multaj subskribintoj krom siaj subskriboj ofte aldonis kelkajn vortojn por esprimi sian subtenon.

Iu trupo de batalantoj notis post sia subskribo: "Se la demonoj aŭdacus entrepreni kriman invadan militon, ni decidemе batalos ĝis plena pereigo de la militinstigantoj. Skribis Tu Kin-ŝeng, militinvalido: "Mi dediĉas mian postlasitan korpon kripligitan en la milito al batalo por paco kaj antiinvado.

Alia popolarmeano skribis: "Ni, la Popola Liberiga Armeo, havas fortan volon kaj gloran tradicion... Estas nia granda devo defendi mondpacon, kune kun la sovetia popolo."

Jeh Ji-ĉih, iu teksisto aldonis la vortojn: "Se la frenezaj hundoj imperialistoj nur kuraĝus mordi homojn, ni certe ilin mortbatus". Alia laboristo komentis: "Atoma energio nepre devas esti uzata por paca konstruo." Juna knabino opiniis: "La junuloj de Ĉinio devas stari en la fronto en la defendo de mondpaco."

Li Kie-ĉen 63-jara maljunulo diris: "Mi suferis de imperialistaj militoj 63 jarojn kaj nun mi volas vivi pace kaj ne lasi venontan generacion fariĝi kanon-karno, tial mi kvankam kun lambastonoj devas mobilizi la najbarojn subskribi siajn nomojn sur tiu ĉi alvoko."

Iu vilaĝanino subskribis por sia infano dirante: "Mi scias, ke mia infano estas pacamanto." Iu knabo Ĉen Ĉang-pi en sia leteró al la Popola Tagĵurnalo skribis: "Mi bezonas patron, patrinon, fratojn, fratinojn, sed ne militon. Mi volas eternan pacon."

Ankaŭ la internaciaj amikoj en Popola Ĉinio partoprenas ĉi tiun kampanjon. Sole en la unua tago de la subskribado subskribis 50 eksterlandanoj. Inter ili troviĝas sovetianoj, inĝenieroj de Ukrajnio, ŝuistoj de Rumanio, flegistinoj de Usono, stenografistoj de Grekio. Malgraŭ siaj malsamaj naciecoj, religiaj kredoj kaj politikaj vidpunktoj ili ja egale postulas pacon.

Simila kampanjo disvolviĝas en ĉiuj aliaj grandaj urboj tra la tuta lando. Laŭ nekompleta statistiko ricevita ĝis la mezo de majo, en Tienzino, komence 500,000 ekzempleroj de la alvoko estis dissenditaj, sed la petantoj postulis ankoraŭ pliajn ekzemplerojn. Tial en la mezo de lasta monato pli ol 240,000 ekzempleroj de la alvoko devis esti plue dissendtitaj kaj en proksimume dek tagoj oni resendis jam 340,000 subskribojn. En Ŝanhajo nur en du semajnoj 400,000 subskribintoj estas varbitaj. En Sian, ĉefurbo de Ŝensi-Provinco 20% (127, 047) el la civitanoj subskribis kaj en Fuĉou, ĉefurbo de Fukien-Provinco, 40% (154, 350) el la civitanoj.

Nun la kampanjo estas disvolviĝanta, konkretaj ciferoj de aliaj lokoj ankoraŭ estas ne akirebla, sed sendube ĉiuj ĉinoj, informiĝintaj pri tiu alvoko subskribos sian nomon. Ĉar kiel konstatite en la porpaca kunveno ja neniu povos respondi per "ne" al jenaj demandoj: "Ĉu iu el vi ne subtenas pacon?" "Ĉu iu el vi pacon nek subtenas nek kontraŭas?" Inter paco kaj milito troviĝas ja nenia vojo neŭtrala. Jam jardekojn la ĉina popolo brave batalas sur la paca fronto, kaj nun, kiam la ŝtata potenco estas en siaj manoj, ili kun pli granda firmeco kaj decidemo batalas kune kun la pacamaj popoloj en ja mondo por la sekureco de la homaro.

Esperantistoj! Subskribu al la Paca Alvoko!

Esperantistoj! Samlingvanoj! Samideanoj!

Kion ni esperas, estante esperantistoj? Kion la iniciatinto de nia lingvo, D-ro Zamenhof, D-ro Esperanto, esperas, kiam li kreis la lingvon? Kion li esperis dum lia tuta vivo, klopodante kaj penante senlace tra ĉiaj malfaciloj? Kial li mortis, kordolorante dum la Unua Mondmilito? Kiuj persekutis kaj mortigis liajn familianojn kaj multajn esperantistojn en diversaj landoj dum la Dua Mondmilito?

Ĉu paco ne estas nia komuna espero, nia komuna batalcelo? Ĉu nia verda stelo ne reprezentas tion? Ĉu esperanto ne estis kreita por la sama celo? Ĉu ne tiu komuna celo nin intime kaj frate kunligas tra la tuta mondo? Ĉu ni ne sinoferas al tiu komuna celo? Ĉu la reakciaj militmanĭuloj ne nin persekutas kaj mortigis multajn el niaj samideanoj pro la sama kialo?

Nia espero ne estas vana. Ni batalas ne solaj. Estas mondskala paca tendaro neniam antaŭe vidita. Ĝi estas tendaro de centoj da milionoj. Malgraŭ la diverseco de nacieco, de politika kredo, de religio, de profesio, de lando kaj de lingvo, ĉiuj kuniĝas por la komuna celo. Ĉu ni esperantistoj ne devas batali en la fronto de la paca tendaro? Nun venis paca alvoko el Stokholmo. La subskriba movado disvastiĝas tra la tuta mondo. Per tio ni revuu nian forton, firmigu nian decidemon, pligrandigu nian tendaron, kaj antaŭenpuŝu la porpacan batalon! Subskribu kaj subskribigu, ĉiuj esperantistoj, ĉiuj verdaj batalantoj tra la tuta mondo! Ludu bone nian rolon! Montru plene nian forton! Sendu kaj sendigu la subskribojn al la Konstanta Komitato de la Mondpaca Kongreso, por kontribui nian forton al tiu ĉi sankta afero.

Ni subtenu la alvokon postuli senkondiĉan malpermeson de atomaj armiloj, postuli kontrolon super la efektivigo de ĉi tiu decido, kondamni la registaron kiu unue uzos ĉi tiujn armilojn, kaj definitive deklari ĝin militkrimulo.

Tutmondaj samideanoj, plenumu nian devon kiel paebatalantoj.



Hung Huang

Armeanoj de PLA Semas sur la Nove Kulturita Kampo per Kavaleriaj Cevaloj.

La Popola Armeo En Produktado

Cen Tan

Ĉinio estas lando en granda ŝanĝo. Eĉ la fluejoj de riveroj estas ŝanĝataj, kaj la neproduktaj montdeklivoj verdiĝas per noveplantitaj arbaroj. Dezertoj kaj grandaj etendaĵoj de nekulturata tero, forlasitaj dum 12 jaroj da milito kaj malsatego, estas iom post iom kovritaj de irigaciaj retaĵoj kaj plugitaj.

La Popola Liberiga Armeo, kies heroaj atingaĵoj metis la fundamenton por ĉi tiuj ŝanĝoj, prenas sur sin pli kaj pli gravan rolon en la transformado de la vizaĝo de Ĉinio. Kvankam ĝi havas longan tradicion de parttempa produktado, la Popola Liberiga Armeo ĉijare sin ĵetis al produkta kompanjo senprecedenta en amplekso kaj karaktero. La celo ne plu estas sole malpezigi al la popolo la imposto-ŝarĝon kaj altigi al la armeo la vivnivelon. Nun la ĉefa celo estas helpi la landon restarigi sur ĝia economia bazo kaj rapidigi la procedon de industriigo.

Nun nur al unuoj en la postfronto estas asignita ĉi tiu tasko. Post la liberigo de Tajvan kaj Tibeto, plejparto el la 5,000,000 anoj de la Popola Liberiga Armeo povas aliĝi al la produkta fronto. Armea produktado, kiel ŝtata produktado, fortigas la socialisman sektoron de la landa ekonomio. Tial ĝi havas grandan signifon en la rapidigo de la transiĝo de novdemokratio al socialismo en Ĉinio.

Kiel ekzemplon, mi rakontos jene iom pri la produktado de iu armegrupo en orienta Hopej-Provinco.

Produkta Organizo

Dum la soldatoj de la armegrupo estis ideologie mobilizataj entrepreni tiun ĉi tute novan taskon, la armeaj aŭtoritatoj ekstarigis la necesajn organizojn direkti la produktadan kampanjon. Kun la helpo de la Komunista Partio produktakomitatoj estis organizataj sur ĉiu nivelo supren de la kompanio. Produktadaj kooperativoj estis starigataj sub ĉiu komitato por realigi la planojn kaj okupi sin kun ĉiutagaj aferoj.

Post unu monato da demokrata diskutado, envolvante ĉiujn de la simplaj soldatoj ĝis la plej altaj komandantoj, la larĝaj konturoj de la jara produktadplano estis martelitaj en formon. En la du sekvantaj monatoj ĉiu unuo faris detalajn planojn kaj preparojn por plenumi sian taskon je la fiksita tempo. Intertempe membroj de la Kompartio finpreparis individuajn planojn por la jaro kaj formis reciprokhelpajn grupojn kun ne-partianoj. La slogano de la tago fariĝis: "Ni estas herooj en batalo, nun ni devas esti herooj en produktado!"

Ĝis la 20an de marto ĉiuj preparoj estis finitaj. La produktada entrepreno estis oficiale lanĉita la saman tagon per granda parado. La soldatoj enviciĝis por inspekto portantaj ambaŭ batalilojn kaj laborilojn; estis malfacile diri kiuj el ambaŭ estis plej poluritaj. Laŭ batalfronta tradicio en la fino de la ceremonio la soldatoj ĵuris plenumi la taskon donitan al ili.

La plano de la armegrupo por 1950 konsistis el 4 ĝeneralaj kategorioj de laboro:

1. Agrikultura produktado projektita por meti la fundamenton por grandaj science direktitaj kaj alte mehanikigitaj armeaj farmoj de la estonto, kiuj, kune kun ŝtataj farmoj estos la pioniroj por moderna kolektiva farmado en Ĉinio.

2. Industria kaj metia produktado komencata modeste por amasigi spertojn en tiu ĉi tute nova sfero de armea aktivo kun la fina celo procedi la plej grandan parton de la agrikultura produktado de la armeo.

3. Civilaj inĝenieraj projektoj esencaj al landa rekonstruo kaj al malebligo de superakvego.

4. Malgrandskala liberatempa produktado celanta sole al la plialtigo de la vivnormoj en la armeo.

Kulturado de Dezertigita Tero

Laŭ tiu ĉi plano la armegrupo kulturos 120,000 muojn da dezertigita tero kaj kreskigos rikoltaĵojn taksitajn modere je 21,230,651 ĝinoj da milio. Kulturi dezertigitan teron ĉirkaŭ la okcidenta bordo de la Golfo de Ĉihli ne signifas nur puŝi plugilon tra la tero. De Ŝanhajkvan, kie la Granda Muro atingas la maron, ĝis la buŝo de la Flava Rivero etendiĝas vasta, ebena spaco de alkala dezertigita lando, dezerta kaj senfrukta kiel la supraĵo de la luno. Ĝis antaŭ kelkaj jarcentoj la tuta regiono estis sub marakvo. Por kulturi tian landon la supra tero devas esti unue lavata pura de alkalo per subakvigo de la distrikto pere de kuranta akvo dum kelkaj semajnoj. Poste la kampoj devas esti subakvigitaj unu fojon potage por malebligi novan alkalon veni de sub la tero. Tio signifas, ke devas esti konstanta provizo de akvo kun sistemo de kanaloj, digoj, akvujoj, akvofluigaj fosoj kaj kontrol-pordoj.

Nova Provizo de Rizo

Estas 4 milionoj da muoj de tia alkala lando en la distrikto kie tiu ĉi armeo estas. En 3-5 jaroj unu kvarono de tiu ĉi lando estos ŝanĝata en verdan ĝardenon de rizo kapabla aldoni jare pli ol 500,000,000 ĝinojn da greno al la nacia provizejo. Kia proporcio de tiu ĉi giganta programo estos portata de la armeo kaj kiom de civilaj regisitaraj oficejoj ankoraŭ ne estas fiksita. Kiel iu altranga oficiro diris, "Tio dependos tute de la grado, kiel kompetente ni povas kutluri 52,888 muojn da tia lando en tiu ĉi jaro."

La armegrupo ankaŭ kontraktis entrepreni parton de la distrikta akvokonservada projekto. En 1951, post la efektivigo de la tuta projekto 1,300,000 homoj estos liberigitaj de la superakvegoj, kiuj okazis ĉiujare dum la lasta duonjarcento.

Planoj por la industria kaj metia produktado enhavas funkciadon de 14 brikfornegoj uniformfabriko, 1 farunmuelejo 1 salorafinejo, 1 ovoprocedejo, 1 vegetaĵolea elpremejo k.t.p. Ferlaborejo estis ekstarigita por fari la necesajn kulturilojn. Metia unuo plektis la salikokorbojn por forpreni la teron en la kanalkonstruo. La armeo ankaŭ faris sakŝtofon por la sablosakoj uzitaj en la konstruado de digoj. Unu paperuzino faras paperon el rizpajlo, kaj tri aliaj estos konstruataj dum la jaro. Per sia ŝiparo de deksep boatoj por fiŝkaptado la armegrupo esperas kapti 1,000,000 ĝinojn da fiŝo. Tiu ĉi speco de produktado, laŭ la plano por 1950, at ingos la valoron de 13,343,486 ĝinoj da milio je la fino de la jaro.

Propra Nutraĵprovizo

Krom tio, ĉiu kompona unuo de la armegrupo entreprenis produkti sufiĉan nutraĵon por kontentigi sian bezonon dum 6 monatoj. La diversaj unuoj ankaŭ bredas brutaron kaj kortbirdojn.

Ĉiuj de tiuj ĉi multoblaj agadoj estas entreprenataj sen plua ŝarĝo al la impostpagantoj. Kiam la produktada entrepreno estis komencita, la registaro antaŭe pagis al la armegrupo unu monatan salajron kun la kondiĉo, ke la sumo estu kompensita je la fino de la jaro. Tiamaniere la registaro povis helpi la produktadmovadon sen ŝanĝi la nacian budĝeton. Post kiam la armeaj kooperativaj entreprenoj estis starigitaj, akcioj estis donitaj al la soldatoj, kaj ili estos kompensitaj kun procento post la aŭtuna rikolto. La plejmulto de la soldatoj donis poŝmonon de unu monato. Per tiaj diversaj metodoj la armegrupo amasigis pli ol 18,000,000 ĝinojn da milio kiel funkcikapitalon.

Estas supozite ke ĉijara produktado, donos al la grupo netan profiton de 36,000,000 ĝinoj da milio, post kiam parto de la elspezoj estos subtrahita. Laŭ la instrukcioj de Prezidanto Maŭ Ze-tung 40 procentoj de tiu ĉi sumo estos distribuataj inter la soldatoj, kiuj entreprenis la laboron. La restaj 60 procentoj estos dividataj en tri egalajn partojn—unu parto estos investita por pligrandigi produktadon; alia parto estos uzata por kovri la elspezojn de la armeo, tiamaniere malpezigante la impostŝarĝon de la popolo venontan jaron; kaj la tria parto estos donata al la registaro kiel imposto.

Kvankam tiu ĉi milita unuo estas ŝanĝata en "armeon de produktado", ĝi devas ankaŭ daŭrigi sian grandan tradicion kiel staligita kaj alte disciplinita "armeo de nacia defendo". Dum 75 procentoj de ĝia soldataro estas okupitaj en produktado ĝis la rikolto en aŭtuno, la ceteraj 25 procentoj estas preparantaj intensan, militan, ekzercan programon por la venonta vintro inkluzive la sendon de multaj homoj kaj oficiroj al militaj akademioj, ke ili povu lerni plue pri moderna mehanikigita milito.

Batalfronta Spirito

Unu el la plej rimarkindaj aspektoj de la produktada entrepreno estas la batalfronta spirito, kun kiu la revoluciaj soldatoj ekkomencis siajn novajn taskojn. La ĝenerala sintenado estas esprimita per populara slogano, kiu venis de la soldatoj: "Ni povas toleradi ĉion—niajn dolorantajn ŝultrojn, vezikigatajn manojn kaj lacajn krurojn—ĉar tiuj ĉi malfacilaĵoj estas la ekirejo por la utilo de milionoj da homoj." La plejmulto de la PLA soldatoj venas de kamparanaj hejmoj kaj ili bonvenigas la eblecon sin okupi je la tero. Tio estas reflektita en centoj da poemoj, nomitaj "Plugilpoemej," kiujn la soldatoj mem verkas kaj gluas sur siajn kulturilojn, tiamaniere konservante sian batalfrontan tradicion verki "Fusilpoemojn" kaj glui ilin sur siajn pafiltenilojn. Tipa plugilpoemo estas la jena:

Pioĉo, pioĉo, amiko multjara,
Post longa disiĝo, pro la soldatiĝo
Manpremas nun ree mi kun vi, la kara!
Ho, penu ni ambaŭ samcele al lukto.
Mi forton ne ŝparu, kaj multe vi plugu,
Por efektivigo de l' tasko—produkto.

Armea Vivo Konservita

Multaj aliaj trajtoj de armea vivo estas transigitaj en produktadan batalon. Kie ajn grandaj unuoj estas amasigitaj, longaj pajlmataj kazernoj ekstariĝas kaj ŝanĝas la lokon en regulan militan bivakejon. Kiel ĉiam la soldatoj leviĝas je la 5a matene, studas 2½ horojn kaj laboras de la 8a a.t.m. ĝis la 4a p.t.m. inkluzive unu horon por tagmanĝo kaj ripozo. Vespere ili diskutas pri la laboro, legas ĵurnalojn, ludas kaj ĉeestas teatrajn prezentadojn. Ofte soldatoj libervole helpas la lokajn kamparanojn dum vespera libertempo.

La scenejo de armea laborprojekto estas simila al karnavalo. La armea muzikistaro ludas kaj plenigas la aeron kun militaj, rapidaj ritmoj. Armeaj kulturaj grupoj prezentas paskvilojn kaj jangko-dancoj (ĉina kamparana danco) dum la ripozperiodoj. Murgazetoj donas vivsimilan, kontinuan, raporton pri la progreso atingita, pri la rezulto de multaj konkuroj kaj pri diversaj produktadaj spertoj.

Kiam mi vizitis la kanal-projekton, komenciĝis torento da pluvo, kiu ŝanĝis la laborlokon en marĉon de koto. Sed la homoj daŭre laboris kiel ordinare. Mi demandis unu el la soldatoj, kiu portis pezan ŝarĝon de tero, kial la laboro ne haltas kiam la laborkondiĉoj estas tiel malbonaj. "Estas pluraj kaŭzoj," li respondis: "Ĉesi laboron antaŭ ol tia ordono estas ricevita estus granda malobeo al la labordisciplino, kiun ni ĵuris plenumi. Krom tio ni subskribis kontrakton kun la registaro, en kiu ni konsentis daŭrigi laboron kiam ajn eble. Kaj kiel vi povas vidi, estas ankoraŭ eble."

Tio estas la speco de decidemo kaj alta revolucia disciplino kiu gajnis la revolucian militon de Ĉinio. Hodiaŭ ĝi garantias la sukceson de la granda entrepreno de la PLA sur la fronto de produktado.

Esperantigis K. Maier

Ciu Trupo Bredas Sian Brutaron

VIVNIVELO ALTIĜAS EN MANĈURIO

La vivnivelo en Manĉurio (Nordorienta Ĉinio) altiĝas rezulte de la disvolviĝo de produktado, stabiliĝo de prezoj kaj ekvilibriĝo de la budĝeto.

Kune kun la restatiĝo kaj altiĝo de produktado, rapide altiĝas la salajro de la laboristoj. En majo lastjare, la meznombra salajro de la laboristoj estis 110 salajropoentoj (laŭ la grenprezo de Nordorienta Ĉinio, ĉiu salajropoento egalas al pli ol unu kaj duona kilogramoj da kaŭliango, altkreska greno kun grandaj grajnoj multe kulturata en Nordorienta Ĉinio). En la jarfino ĝi atingis 140 poentojn. Ĉijare la Nordorienta Popola Registaro jam decidis plue altigi la salajronivelon je 7% aŭ 8%.

Efektivaj salajroj de la laboristoj leviĝis je 27 procentoj dum la pasinta jaro kaj ankoraŭ altiĝos en la nuna jaro. Ĉar prezoj de pli gravaj varoj, kiaj greno kaj ŝtofo, jam reduktiĝis je 3 ĝis 6 procentoj dum la unua kvarono de tiu ĉi jaro, do la pliiĝo en la efektivaj salajroj estas despli granda.

Plie, la laboristoj kaj iliaj familioj aĉetas siajn ĉiutagajn necesaĵojn ĉefe de la kooperativoj, kiuj vendas al siaj membroj je prezoj pli malaltaj ol merkataj. Sepdek procentoj de la laboristoj kaj iliaj familioj loĝas en fabrikaj pensionoj kaj 90% el ili ĝuas senpagan loĝadon. Por ili ankaŭ estas rabato en akvo- kaj elektro-kosto, kaj en la prezoj de tramo-, teatro- kaj kinobiletoj.

La vivrimedoj de laboristoj plue pliboniĝis dank' al la laborasekura fonduso, en kiun la registaro pagis lastajare monsumon egalan al 11 procentoj de la tuta salajraro de la laboristoj en peza industrio plus 9 procentoj de la tuta salajraro de la laboristoj en malpeza industrio. Nun estas du kuracejoj, du varmfontaj sanatorioj kaj unu laborista hospitalo funkciataj de la Nordorienta Laborista Federacio, kaj 22 infanvartejoj, 6 pensiulejoj, 2 orfejoj, 4 sanatorioj kaj 2 libertempaj sanatorioj funkciataj de diversaj entreprenoj. Entute estas pli ol ducent laboristaj kuracejoj kaj 40 hospitaloj. En ili laboras nun pli ol 4,000 medicinaj laborantoj. La tuta laboristaro kaj ĝiaj familianoj konsistantaj el pli ol 1,500,000 personoj ricevas senpagan aŭ duonpagan kuracadon kaj aliajn avantaĝojn de la labora asekuro.

Krome, la registaro asignas grandan sumon por konstrui 1,730,000 kvadratajn metrojn da novaj domoj por la laboristoj. Pro la disvolviĝo de la produktado, estas forte sentata nesufiĉo de laborfortoj. Senlaboreco tie fariĝis jam fabelo de la pasinteco. Lastajare la ŝtatposedaj entreprenoj dungis 240,000 novajn laboristojn pli ol la antaŭlastan jaron, kaj en la kuranta jaro estas bezonataj 220,000 pli. Ankaŭ privataj entreprenoj spertis rapidan kreskon dum la pasinta jaro. Privataj fabrikoj en Mukdeno kreskis de 9,700 ĝis 12,000 kaj la nombro de laboristoj pli multiĝis je 18 procentoj.

En la kamparo, kamparanoj aĉetas ĉevalojn kaj ĉarojn, kaj konstruas ankaŭ novajn domojn. Dudek milionoj da kamparanoj ekposedis teron disdonitan al ili ekde 1945. Kun helpo de la registaro, la agrikultura produkto leviĝas jaron post jaro. En 1949, la tuta areo de kulturita tero pli vastiĝis je pli ol du milionoj da hektaroj, kaj la meznombra produktivo por ĉiu hektaro leviĝis de 750 kilogramoj en 1947 ĝis 960 kilogramoj en 1948.

Pro tio ke ŝtataj komercaj kompanioj kaj la kooperativoj senpere aĉetas la superfluan grenon de la kamparanoj kaj liveras al ili industriaĵojn, tial do minimumiĝis la ekspluatado de makleruloj. La sama kvanto da greno interŝanĝiĝis en 1949 je kvarobla kvanto da ŝtofo interŝanĝita en 1946. En tio evidentiĝis la pliboniĝo de la vivtenado de la kamparanoj.

La publikgren-kolekto (agrikultura imposto) estas nun malaltigita, tial ke profitoj devenantaj el la ŝtatposedaj entreprenoj nun okupas la unuan lokon en la Nordorienta enspezo. En 1948, publika greno okupis 23 procentojn de la agrikultura produkto de la kamparanoj, kaj en la pasinta jaro ĝi estis 19.5 procentoj.

La ĝenerala leviĝo de vivnivelo ankaŭ alportas pli multe da studentoj al lernejoj. En la tuta regiono estas pli ol 4,752,600 lernantoj en universitatoj, mezgradaj kaj elementaj lernejoj, ĉirkaŭ 11.5% de la tuta loĝantaro en la Nordoriento. En la mezlernejoj, gefiloj de laboristoj kaj kamparanoj konsistigas pli ol 50% de la tuta lernantaro. En elementaj lernejoj, gefiloj de laboristoj, kamparanoj kaj urbaj malriĉuloj konsistigas 81.3%. Naŭ mil laboristoj nun studas en tri laboristaj universitatoj kaj dekdu teknikaj institutoj. Entute pli ol 16,000 studentoj studas en 16 institutoj kaj universitatoj. Krom regulaj lernejoj ankaŭ estas libertempaj mezlernejoj aŭ specialaj kursoj por eduki laboristajn kaj kamparanajn kadrojn. Stariĝis ankaŭ mallong-periodaj mezlernejoj kaj kursoj en mezlernejoj por laboristoj kaj kamparanoj.

Nun la nombro de mezlernejoj pliiĝis je 130% kompare kun tiu sub la japana okupado. La nombro de elementaj lernejoj pliiĝis je 81%. Tamen la kvanto de lernejdomoj kaj instruistoj ne sufiĉas. Tial krome ankaŭ estas 'malgrandaj instruistoj' (t. e. lernantoj kiuj instruas kion ili ĵus lernas) kiuj instruas post siaj lernhoroj. Kamparanoj ankaŭ mem establis lernejojn. Kaj pli multe da lernejoj estos starigitaj por satigi la kreskantan postulon de la popolo por kleriĝo.

La leviĝo de la popola vivnivelo estas la rezulto de la disvolviĝo de produktado. Lastajare la industria plano de la Nordoriento estis superplenumita je 4 procentoj. En agrikulturo, malgraŭ la pluvmanko en Heilungkiang kaj la superakvego en parto de Suda Manĉurio, la tuta produktakvanto ankoraŭ superis tiun de la antaŭa jaro. Ekzemple, 50,000 tunoj pli da greno estis produktita en Heilungkiang lastajare kompare kun 1948.

La rapida kresko de ŝtat-posedaj entreprenoj estas precipe signifoplena, ĉar la profitoj el ŝtataj entreprenoj formas preskaŭ duonon de la enspezoj de la Nordorienta budĝeto. Ili do multe malpezigas la impostan ŝarĝon de la popolo. Pliigita industria produkto ankaŭ liveras al la popolo pli da konsumaĵoj.

Sur la bazo de lastajara disvolviĝo, la registaro asignas pli ol 50 procentoj el la budĝeto por plua investo en ŝtatajn entreprenojn kaj 42 procentoj el ili iros en industrion. Ĉar Manĉurio estas bazo de ĉina peza industrio, ĝia rapida kresko estas ege grava por la regionoj ŝude de la Ĉina Granda Muro.

La Nordoriento estas bona ekzemplo al la loĝantoj ŝude de la Granda Muro, kie la nacia budĝeto proksimiĝas al ekvilibro kaj prezoj fariĝas tagon post tago stabila.

Ĵelezo

Atentu, Samideanoj

Baldaŭ venos la 1-a de aŭgusto, la signifplena tago por ĉina revolucio. Car antaŭ 23 jaroj en tiu tago unuafoje organiziĝis en Ĉinio la Ruĝa Armeo, gvidata de la Ĉina Komunista Partio. Ĝi estas kerno de la nuna Popola Liberiga Armeo. Dank' al ĝi la ĉina revolucio rapide kreskis, sukcesas kaj donas grandegan helpon al defendo de mondpaco. Tial tiu tago fariĝas en Ĉinio granda festo.

Karaj samideanoj, se vi simpatias la ĉinan revolucion, se vi konsideras militan forton de Popola Ĉinio la forta garantio de mondpaco, esprimu viajn ĝojon kaj gratulon per salutleteroj al la Popola Liberiga Armeo. Ni volonte ilin transdonos por vi. Tio ege helpos fortikigi solidarecon inter la ĉina popolo kaj la popoloj de viaj landoj. Skribu tuj, kaj organizu amasajn skribojn, samideanoj!

Manĉuria Kamparo Survoje al Luma Estonto

Feng Ming

Jam du jaroj mi ne venis al la kamparo, ek de 1947, la ŝtormaj tagoj de agrara reformo. Vidate supraĵe, la flavteraj pajldomoj, ĉirkaŭbariloj el flosoj, maizgrajnoj sur tegmentoj, sledoj sur neĝvojoj, ĉi ĉio ŝajnas sama kiel antaŭe sen ia ajn ŝanĝo. Tamen ekloĝinte ĉi tie, vivante kune kun la kamparanoj dum spaco da tempo, vi trovos, ke granda estas la ŝanĝo en la kamparo dum ĉi tiuj du jaroj.

Mi ne plu vidis terlitojn sen mato, nek virinojn kiuj ne forlasis sian terliton pro manko de vatita vesto. Mi vidis nur unu infanon nuda, tamen ne pro manko de vesto, sed pro troa varmeco de la terlito.

Ĉe Kungse Tun, en Demokrata Vilaĝo, Keŝan, en la Nordoriento, (Manĉurio), mi iam faris simplan enketon. Ĉi tiu vilaĝeto (tun) ampleksas 28 familiojn. La tuta vilaĝeto estas granda produkta grupo. La grupestro Jang Sian-ting, tridekjara, sperta kaj kapabla homo, malriĉa kamparano en la pasinto, nun jam havas du ĉevalojn, unu ĉaron, dekdu hektarojn da agro, produktante dekkvin hektolitrojn da greno, eksklузive enspezon el flanka produktado. La aliaj dudek sep familioj statas pli malpli same, preskaŭ ĉiu familio havas restantan grenon.

Laŭ ne kompleta enketo en 1949, la kamparanoj, kies vivnivelo atingis tiun de mezkamparanoj, estis sep- aŭ ok-dek procentoj el la kamparanoj de la tuta gubernio. Malriĉkamparanoj estis nur ĉirkaŭ dek procentoj.

Viveca kaj intensa estis la vintra flanka produktado. Mi iam vidis kelkdek ĉarojn en vico longa je kilometroj, kiuj iris al montoj por transporti lignon. Viroj eliris por fajrolignoj. Virinoj selektis hejme fabsemojn. Infanoj kolektis kanabotrunketojn.

Lastjare ne estis riĉa rikolto en Keŝan. Iuloke en la printempo estis detrua ventego, kaj en la somero estis kvardek tagoj da senpluveco, tamen, kompare al la jaro 1948, en la tuta gubernio la rikolto pliiĝis je okdek mil hektolitroj.

La ŝtato intence malpliigis la tondilan diferencon inter la prezoj de iudustria kaj agrikultura produktaĵoj, ege pliigante la efektivan enspezon de la kamparanoj. En la jaro 1948, unu dekalitro da sojfabo interŝanĝiĝis je kvar ĉinaj futoj* da Liberiga Ŝtofo, sed en la jaro 1949 je ses futoj. Ĉe provizaĵ-disvendaj kooperativoj, kamparanoj interŝanĝis ŝtofon kaj novjarajn varojn per sojfabo kaj tritiko, farante negocon je kelkaj milionoj da ĉinaj dolaroj. Aĉetante, la kamparanoj ne plu demandis, kio estas pli malkara, sed kio estas pli bona.

Ne nur pliboniĝis la vivo de la kamparanoj, sed pli grave, ankaŭ pliboniĝis la kondiĉoj de produktado. Multaj kamparanoj aĉetis ĉevalojn kaj ĉarojn. Laborist-Kamparana Vilaĝo ĉijare aĉetis dekdu ĉevalojn. En Paco-Vilaĝo iu kamparano aĉetis modernan plugilon per du hektolitrojn da fabo. En kunveno por disvastigi novtipajn agrikulturajn instrumentojn, mi vidis, kiel la kamparanoj varme amas tiujn novajn instrumentojn. Ili tiel amas novajn instrumentojn, ĉar per ĉi tiuj ŝpariĝas laborado kaj pliiĝas laboraĵo, kio ebligas plian kulturadon. Ili ĉiuj volas pligrandigi produktadon kaj multe kulturi nekulturitan teron. Kaj en Norda Manĉurio, ekzemple en lokoj kiel Keŝan, estas favoraj kondiĉoj por kulturi virgan teron.

Pro plibonigo de sia vivo, la kamparanoj montras varman deziron kaj postulon al kulturo. Maljunaj kamparanoj, kiuj pasigis duonon de sia vivo en mizero, ne havis feliĉon akiri kulturon. Tamen nun, en vintraj lernejoj ili kaptis ĉi tiun feliĉon. Ili tiel seriozas kaj tiel cerbumas, ke ili uzas kiel nigratabulojn ĉion uzeblan: neĝtero, pordotabulo, ŝranko, rando de terlito, kaj muro. En la kamparo ĉie vi povas vidi kretoskribaĵon. Ilia lernado estas fruktodona. Tiuj, kiuj tute ne povis legi, nun jam povas skribi simplajn kontojn kaj leterojn.

Feliĉaj estas la infanoj. Nun, pro pliboniĝo de vivo, ili jam povas lerni. Ĉijare, en Emancipo-Vilaĝo, el la infanoj kiuj atingas lernaĝon, naŭdek procentoj povas viziti lernejon. En Novkampara Vilaĝo aliĝis ĉiuj infanoj lernaĝaj. Ne sufiĉas lernejdomoj kaj ankaŭ mebloj. En pluraj vilaĝoj, la vilaĝkadroj konsiliĝis pri konstruado de lernejdomoj. La ligno transportitaj de la montoj, unue uziĝos por konstrui lernejojn.

Revene, en trajno, mi renkontis kvar lernantojn el la kamparo, ĉiuj ĉirkaŭ deksep- aŭ dekok-jaraj. Ili estis senditaj de la gubernia registaro por lerni en Mukdeno. Ili estis tiel ekscitiĝaj kaj ĝojaj, kredante je sia luma estonto. Post kvin aŭ dek jaroj, ĉi tiuj filoj de malriĉaj dungitaj kamparanoj fariĝos instruistoj, kuracistoj, teknikistoj aŭ inĝenieroj. Ili povos propramane konstrui staciojn de maŝinoj kaj traktoroj, staciojn de elektro, kaj lernejojn kaj hospitalojn. En iliaj ĝojaj okuloj mi kvazaŭ vidis la feliĉan estonton en la kamparo.

Elĉinigis Velo

*. 1 ĉina futo = 1/3 metro

ŜANHAJO EN TRANSFORMIĜO

Ŝanhajo estas la plej granda urbo kaj la plej grava ekonomia centro en Ĉinio. Troviĝas en ĝi ĉ. 5,000,000 loĝantoj, 12,000 fabrikoj kaj 10,000 magazenoj kaj kompanioj. Ĝi estis konata kiel "paradizo de aventuristoj". Ĉar antaŭe ĉiuj imperialistoj havis tie sian privilegiojn.

Ŝanhajo estas la plej granda haveno en Ĉinio, kie trairas grandparto el la importaĵoj kaj eksportaĵoj de Ĉinio. Varoj el imperialistaj landoj de tie enpenetris la internajn partojn de Ĉinio kaj krudaj materialoj el ĉiuj partoj de Ĉinio koncentriĝis tie por la bezono de imperialistoj. Tial ĝi fariĝis tubo por sangsuĉado el la tuta Ĉinio.

Sub tiaj cirkonstancoj kreiĝis en Ŝanhajo komercado "prospera". La eksterlandaj kapitalistoj, kaj ĉiaj ĝiaj agentoj, ekz. la kompradoroj, la politikaj lakeoj, povis tie plezure ĝui sian diboĉan vivon. Same ankaŭ la bienuloj pasigis sian tempon tie en plena komforto per la fruktoj akiritaj per sango kaj ŝvito de la kamparanoj. Sur tiu bazo prosperis Ŝanhajo, kaj estis eĉ mondfama.

Post la venko de antijapana milito formale la privilegioj de imperialistoj malaperis, sed esence ĝi restis la sama.

Agonio de la Malnova

Post kiam la standardoj kun stelstrioj k.s., kiuj simbolas la koloniecon de Ŝanhajo, malaperis de sur la imponaj konstruoj apud la Huangpu-Rivero, kiu ligas Ŝanhajon al la maro, la aventuristoj longe konsiderintaj Ŝanhajon sia sangsuĉejo unu post la aliaj returnis siajn hejmlandojn kun plena malespero. La altaj burokratoj kaj kompradoroj panike forrifuĝis aŭ sin kaŝis kiel hundoj. Tuj poste venis malprospero al la pompaj kompanioj, antaŭe provizintaj multkostajn komfortaĵojn al altrangaj sinjoroj kaj sinjorinoj.

Modeloj kun oraj vestoj kaj pinkaj aŭ helverdaj mamumoj en la montrofenestroj perdas allogecon kaj neniu plu tie restas kun admiraj rigardoj. Al la brilaj kaj altkvalitaj pudroj kaj parfumoj oni sentas nur malamon kaj abomenon. Tial la Arta Kompanio Eŭrop-Azia kaj la imponega Juvela Kompanio unu post la alia ĉesis funkcii.

La tajlorejoj de novtipaj vestaĵoj kiel Hungsiang-Kompanio, kiu iam rekordis dudek ĝis tridek mil mendojn de surtutoj kaj peltoj ĉiujare kaj kies plej alta tagmendo de peltoj el pur-



Ŝanhajaj Studentoj al la Amasa Kunveno por Defendo de Mondpaco

puraj zibeloj, flavaj musteloj, nigraj vulpoj kaj leopardoj nombris 300, nun estas entute forgesitaj, kvankam ili malaltigas la prezon ĝis nur 30% de la aĉeta prezo. Estas tempo paki siajn kofrojn por la eksterlandaj komercistoj en kies kompanioj viciĝas ĉapeloj, ĉemizoj kaj kravatoj kun mondfamaj, komercaj markoj kaj troviĝas ankaŭ nilon-ŝtrumpoj el Usono kaj altkvalitaj ŝtofoj el Britio. Magazenojn de antikvaj boteloj, jadaj budaoj, pentraĵoj kaj skribaĵoj de Tang- kaj Sung-Dinastioj* honoris nur pulveroj.

Forvelkiĝas ĉio, kio interligiĝas kun la burokrataro, ekspluatintoj kaj spekulaciistoj.

Nova Vojo

Vegetas kaj putras la malnovaj, sed samtempe kreskas kaj fortikiĝas la novaj. Tion ebligas la jenaj faktoroj:

(1) Ĉar stabiliĝas la monsistemo kaj varprezo, glatiĝas la vojo por regula disvolviĝo de komercaj kaj industriaj entreprenoj.

(2) Sub la gvido kaj helpo de la registaro per produktplano kaj ŝtataj mendoj al privataj entreprenoj kaj edukado al iliaj administrantoj, la entreprenoj trovis ĝustan vojon kaj rimedojn por konkeri la malfacilojn.

Komercoj, industrioj, kiuj sin savis el paralizita kaj spekulacia karaktero kaj sinturnas al nova principo "servi al popolamaso", ĝuas belan prospekton de senlima prospero.

Agentejoj por enlandaj produktaĵoj tra la tuta Ŝanhajo estas ĉiam plenaj je klientoj kaj la negoco estas prospera. Produktaĵoj venintaj el ĉirkaŭaj vilaĝoj estas malkaraj kaj utilaj. Ili ricevas fervoran akcepton de la civitanoj en Ŝanhajo.

Ĉiuj scias en Ŝanhajo, ke la tri grandaj ŝtofkompanioj Siedasiang, Baodasiang kaj Sindasiang, en lastaj du monatoj estas plenigitaj de klientoj. Kial ilia negoco povas esti tiel prospera? Tie kuŝas ja nenia sekreto. Ĉefe ili liveras malkarajn kaj utilajn ŝtofojn, ili povas vendi siajn varojn je malgranda profito kaj vere plenumas la principon servi al popolamaso.

Wing On, Sincere, Sun Sun, Tasin, Lihua kaj Kompanio de Ĉina Nacia Produkto estas la plej grandaj ĉiovendejoj en Ŝanhajo. Antaŭe ankaŭ ili celis ĉefe servi al "noblaj gesinjoroj", sed post la liberiĝo ili ŝanĝis sian administran principon. Fakoj de tualetaĵoj malpliiĝis, kaj tiuj de silkaĵoj eŭropaj vestoj kaj luksaĵoj aŭ minimumiĝis aŭ foriĝis. Antaŭaj importitaj varoj estas anstataŭitaj per enlandaj produktoj. Disvolviĝas agentfakoj por industriaj organizoj. Iniciatiĝas popularaj manĝejoj. Post tia reformo venas anstataŭ klientoj de "noblaj gesinjoroj" amaso da simplaj diligentaj civitanoj. Laŭ tiu negoca principo ilia komercado iom post iom normaliĝas. La negoco de Tasin-Kompanio pli ol double grandiĝas. Lihua-Kompanio sukcesas starigi sian bilancon. Malnovaj ŝuldoj de Tasin-Kompanio sumintaj je 520,000,000 ĉinaj dolaroj estas repagitaj per la profito ricevita, kaj kies taga enspezo atingas 30,000,000 ĉinajn dolarojn. Stato de la ceteraj kompanioj Wing On kaj Sincere ankaŭ multe pliboniĝas.

Mastroj de manĝejoj kaj restoracioj ne plu malĝojas pro malkresko de klientoj, post kiam ili liveras malkostajn manĝaĵojn. La mastro de Dasanjuan, la plej granda restoracio, kies klientoj antaŭe konsistis ĉefe el burokratoj, spekulaciistoj, kaj riĉuloj, tute ne volas cedi al la nova cirkonstanco post la liberiĝo. Fine li forkuris lasante post si amason da ŝuldoj. La laborantoj en la restoracio devis mem administri la entreprenon por teni sian vivon. Ili reformis la negocan metodon kaj post apenaŭ duonmonato ĉiuj ŝuldoj likvidiĝis kaj restariĝas la bilanco.

Laboristoj Helpas Kapitalistojn por Konkeri Malfacilojn

Unu el la ĉefaj faktoroj, kiuj helpas konkeri malfacilojn en komercaj kaj industriaj entreprenoj estas la alta konscio de laboristoj. Ili sub gvido de Ŝanhaja Laborista Sindikato aktive klopodas akiri kunlaboron de la kapitalistoj, intensigi laboran disciplinon, kaj bone antaŭenpuŝi la produktadon. Tial kreiĝas en Ŝanhajo la sistemo de interkonsiliĝo inter laboristoj kaj kapitalistoj. La interkonsiliĝo estas bazita sur egalrajto, propravolo, laŭkontrakto kaj profitdono al ambaŭ flankoj. Per tiu ĉi sistemo estas solvitaj multaj problemoj inter laboristoj kaj kapitalistoj.

La sukceso kuŝas en tio, ke la laboristoj por konkeri malfacilojn en industriaj kaj komercaj entreprenoj iniciative efektivigis la malpliigon de administraj kostoj kaj siaj salajroj.

La okuloj.....*(Daŭrigo de p. 8)*

Kiam la kleriga kampanjo de Porto-Arturo kaj Dajren reviziis la progreson de l' movado en la fino de printempo, 1949, Liĉiakoŭ estis nomata 'modela vilaĝo en lernado.' Tio pli instigis la entuziasmon de la vilaĝanoj. Ĉie okazis konkuroj inter klasoj, geedzoj, najbaroj kaj parencoj. En tiu somero Liĉiakoŭ refoje ricevis la saman honoran laŭdon.

Jarfine la 96 kamparanoj aliĝintaj al regulaj kursoj estis ellernintaj de 500 ĝis 1,200 ideografojn. Kamparanino Ĉiang Su-lan kiu estis elektita tri sinsekvajn sezonojn 'modela lernanto', nun povis legi kaj skribi 1,700 ideografojn. En la speciala hejm-studa grupo, kvin virinoj jam lernis 500 vortojn; ok, 400; kaj ses, 300.

Efiko de la Kampanjo Rimarkindaj ŝanĝoj montriĝis en Liĉiakoŭ, post kiam ĝiaj loĝantoj ellernis legi kaj skribi. Antaŭ la komenco de la kontraŭanalfabeta movado, nur ses ekzempleroj de la loka tagĵurnalo estis abonataj tra la tuta vilaĝo. Hodiaŭ preskaŭ ĉiu familio havas sian tagĵurnalon. Pro tio ilia koncepto pri vivo estas larĝigita kaj iliaj vivoj multe pliriĉigitaj.

La politika nivelo de'la vilaĝanoj estas ankaŭ multe altigita. Kiam la registaro alvokis la kamparanojn planti arbojn lastan aŭtunon, la kamparanoj plenumis sian kvoton de 3,000 arboj en unu tago, eĉ antaŭ ol la vilaĝaj kadroj komencis la mobilizan laboron. Ili montris la saman politikan konscion de respondeco kiam venis tempo por pagi la agrikulturajn impostojn. Longe antaŭ la pagdato ili jam bone sekigis, klasifikis kaj pakis sian grenon, preparante ĝin transporti al la publika grenejo. Kiam la kadroj komencis klarigi al ili en kunveno la gravecon de la impostoj kaj kiel la impostoj estas uzataj por ĉies bono, uuu kamparano ekparolis, dirante, "Kamarado, mi bone tion konas. Tio estas skribita en la tagĵurualo. Ĉu vi forgesas ke ni estas ne plu blinduloj kun okuloj?"

Eĉ familiaj malpacoj malmultiĝas, kiam la kamparanoj, precipe la virinoj, estas akirintaj pli larĝan scion dank'al legado. Ekde lasta junio, Liĉiakoŭ komencis disponi hejmajn kverelojn en vilaĝaj interpacigaj kunvenoj kaj longdaŭraj kvereloj en multaj familioj estas finfine amike solvitaj.

Kiel ĝojaj la kamparanoj estas, kiam ili atingas la gradon de leter-skribo, taglibro-noto kaj kont-enskribo! En la letero al sia ĉefronta edzo, Vang Kvej-lan skribis jene, "Laboru energie kaj batalu brave! Ĉi tiun leteron mi mem skribis. Sen la Komunista Partio, kiel mi povus skribi al vi propramane?"

Ekzemplo por la Tuta Lando La kleriga movado ankaŭ ricevas rimarkindan rezulton en la urbaj distriktoj. Ekzemple, en lasta junio, 37% de la 1,600 laboristoj en la Dajrena Ŝpinejo estis analfabetoj. Sed je la jarfino ĉiuj de la 310 viraj kaj 280 inaj analfabetaj laboristoj jam lernis de 100 ĝis 300 ideografojn. Estas atendate ke ili atingos la nivelon de 1,200 ideografoj en 1950. Ĉi tiom estas sufiĉe por la lego de tagĵurnaloj kaj popularaj libroj, kaj sur ĉi tiu bazo estas pli facile fari pluan progreson.

La kleriga kampanjo en Porto-Arturo kaj Dairen donis tre kuraĝigan ekzemplon sekvindan por la tuta lando. Similaj movadoj kvankam ne tiel grandskalaj, estas organizataj en multaj malnove liberigitaj regionoj kaj tuj post kiam la nove liberigitaj regionoj estas atingintaj la objektivajn kondiĉojn por ĉi tia kampanjo kontraŭ analfabeteco, ili certe ankaŭ sekvos la ekzemplon de la loĝantaro de Porto-Arturo kaj Dajren.

Trad. Pandiŝo

RIMARKO

En nia gazeto ni uzas la vorton "kadro", kiel ĝia originalo la franca vorto "cadre" estas internacie uzata nun, anstataŭ por ĝia originala senco de borderaĵo aŭ skeleto. Ĉar la nova senco devenis de la malnova, ni opinias, ke ne necesas fabriki novan vorton.

LA RED.

Laborantoj de Sinja Medicina Fabriko en funkciigo de maŝinoj anstataŭis nafton per la pli malkara karbo kaj entreprenis kromajn laborojn por kribri la forĵetitajn materialojn, ripari difektitajn motorojn. Por salajroj iom pli altaj ili propravole konsentas rabaton.

Mastro de la ĉiovendejo Ŝengbingi en la komenco kredis je la mensogoj de Kuomintang, tute malesperis pri la komerco kaj provis konvinki la komizojn, pri tio ke estas necese ĉesigi funkcion de la firmao. Kompreninte lian malfacilon la komizoj senlace lin konsolis kaj kuraĝigis, proponante al li malpliigon de siaj salajroj kaj nenecesaj laborantoj kaj komercon agentan por venki la malfacilojn. Per tiuj rimedoj ĝi fine povas facile pagi la impostojn, salajrojn kaj krome restas ankaŭ neta profito por aĉeti novajn varojn.

La mastro de la ĉiovendejo Kosmopolitan antaŭe eltiris grandan sumon el la kapitalo intencante fermi la firmaon. Sed post kunveno de la mastro kaj komizoj, la lastaj decidis pruntedoni al la firmao la jaran gratifikon kaj proponis al li pagi ŝuldojn per hipteko de parto el la restantaj varoj. Krome la komizoj altgradaj malpliigis la salajron kaj la administrajn elspezojn, kaj eĉ anstataŭis unu el la du manĝoj per nura kaĉo. Post kvarmonata batalo fine ili konkeris la malfacilojn.

Tian altan konscion la laboristoj, kaj komizoj akiras ĉefe dank' al la kolektiva lernado, kiun organizas sindikatoj. En la lernado ili iom post iom liberiĝas el influoj de la reakciuloj kaj fariĝas pli klaskonscia. Ilia sinteno al laboro fariĝas serioza kaj iniciativa.

* * *

Oni povas klare vidi, ke Ŝanhajo estas en transira periodo. Ĝi transiras de la malnova al la nova, de karaktero konsuma al produktiva, de falsa senbaza prospero paŝo-post-paŝe al vera prospero kunliganta la vastan popolamason, unuvorte de ekonomia bastiono de imperialistoj kaj burokrataj kapitalistoj al komerca, industria centro de la popolo kaj por la popolo. Kvankam en kelkaj flankoj la novaj elementoj ankoraŭ ne estas sufiĉe fortaj kaj ne tre kontentigaj, tamen ili estas kreskantaj. Male, la malnovaj faktoroj estas ĉiam pereantaj.

Honfan

* "Tang" estis dinastio 618-906 p.K., "Sung" estis dinastio 960-1276 p.K. En tiuj du dinastioj estis multe da eminentuloj, kiuj tre lertis pri skribado de ĉinaj ideografoj.

LEGU

en venonta numero:

Kiel Ĉinio Konkeris Inflacion?
Scienco en Nova Ĉinio
Laboristoj Amas Prezidanton Maŭ
Sur Vagonaro "Amasoj"
Ĉinaj Geknaboj en Liberiga Batalo

KOREKTOJ

En la lasta numero estas kelkaj eraroj. Ili devas esti korektitaj jene:

"Li Hŭa" (sub la lignogravuraĵo sur p. 2) legu "Gu Juan".

"Tan Han" (dekstre de la lignogravuraĵo sur p. 6) legu "Jan Han".

"Egalas 500 kg." (en la rimarko de "Nova Tipo de Kampula Gastejo" sur p. 8) legu "egalas 500 gramojn".

Laboristo-Fabrikestro Liu Jeng-Juan

Feng Ĉung

Liu Jeng-juan, la estro de la Ŝihĉingŝan-Elektracentrejo, ekmetilernis en fabriko je la aĝo de 13 jaroj. Li travivis tridek malfacilajn amarajn jarojn ĝis la liberigo de Harbin en 1946. Li estis elektita unuagrada laborheroo, kiam li riparis la No. 5 generatoron en la Harbina Elektracentrejo. Kaj poste per kombino de No. 5 kaj No. 6 generatorojn li garantiis la elektroprovizon de Harbin. Li estis elektita speciala laborheroo kaj delegito al la Sesa Tutĉinia Kongreso de Laboristoj. Tiam li glore aliĝis al la Ĉina Komunista Partio. Pli poste li fariĝis la fabrikestro de Harbina Elektracentrejo. Kiam Ĉangĉun liberiĝis, li estis transigita tien por la tasko restarigi la elektracentrejon tie. Plenuminte sian taskon tie li denove fariĝis vicestro de Fuŝun-Elektracentrejo. En marto ĉijare li estis transigita al Pekino por estri la Ŝihĉingŝan-Elektracentrejon.

Sciante ke li estis laborheroo, la laboristoj kaj funkciuloj de la elektra centrejo intime nomas lin 'Aĝa Heroo Liu'.

Precipe atentante pri la lernado de laboristoj-kamaradoj, li diris al ili: "Fratoj! Fariĝinte mastroj ni nepre devas lerni!" Li des pli zorgas pri la vivo de la laboristoj. La trian tagon post lia alveno al la elektrejo, li rondiris la loĝejojn de la laboristoj por detale inspekti. Li vidis, ke multaj laboristoj loĝas en terdomoj malgrandaj kaj trafluetitaj. Laboristo kun familio de ses anoj loĝas en ĉambro kun flankoj tri metrojn longaj. Tial li disponis kelkajn nove konstruitajn domojn al tiuj kiuj plej urĝe bezonis. Ankaŭ estis decidite, konstrui 25 novajn domojn kiel loĝejojn por la laboristoj kaj ripari la kadukajn.

La maljuna heroo ja estas babilema, tamen en la kunveno de laboristoj kaj funkciuloj de la tuta elektracentrejo li parolis tre koncize. Demandite li respondis: "Ne estas granda halo kaj estas tiel malvarme. Kial mi senfine parolus, sur la estrado, dum kamaradoj staris senŝirme en la frosta aero?" Iun tagon la laboristoj laboris sub pluvo, kaj trempiĝis iliaj vestoj. Ili tremadis pro la frosto. Tamen ili plenumis sian taskon. Kiam Maljuna Liu tion vidis, denove doloris al li la koro. Eĉ ĝis nun li ankoraŭ ofte sin riproĉas: "Tio ja estas la devo de la administracio. Por kamaradoj laborantaj eksterdome ni devis antaŭ-longe pretigi pluvmantelojn. Grava estas sano de laboristoj. Kion faru, se ili malvarmumus sub la pluvo!"

Kiam ajn li havas libertempon, li iras al laborejo babili kun la laboristoj, dirante al ili kiel funkciigi maŝinojn kaj demandante pri tio kaj ĉi tio: "Ĉu bone funkcias la maŝino?" "Vi estas filtranta oleon! Ĉu estas akvo en la oleo?" Kaj fine li ĉiam diras: "Frato! Bone lernu!" Ĉiumatene irante de la loĝejo al la fabriko, li ĉiam rondiras por vidi la kaldronejon, la maŝinejon, la elektrejon kaj la transportejon. Dum la laborhoroj li iradas tien, kie estas grava laboro. Post la vespermanĝo oni povas vidi lin en la klubo. "Frato! Venu ludi!" Li nomas ĉiun laboriston frato kaj iom post iom la laboristoj ankaŭ tiel nomas lin. Tia komprenema fabrikestro ege ĝojigas la laboristojn. Ili senrezerve malkaŝas al li ĉion el la koro. Li foje diris al la laboristoj: "Antaŭe oni devis flati por sekurigi sian laboron. Okaze de novjara tago aŭ aliaj festtagoj oni devis donaci al la fabrikestro porkaĵon kaj ovojn. Nun ni ne faru tion. Se vi volas donaci al mi, donacu kiel eble plej multajn raciigajn proponojn. Kien ajn li iras, li estas ofte haltata: "Fabrikestro, frato, ni babilu!" La laboristoj ankaŭ ofte vizitas lin en la loĝejo.

La maljuna heroo amas ĉion en la fabriko, des pli la maŝinojn. Li diras al la laboristoj: "Se difektiĝus maŝino kaj haltus nia elsendo de elektro, haltus ankaŭ la laboro en ĉiuj fabrikoj kaj tuj sciiĝus pri tio Prezidanto Maŭ." Kiam li alvenis al la ĉefurba elektra centrejo, la No. 3 maŝino estis en riparo. Li iris vidi, kiam ajn li havis tempon. Iun nokton la elektrometro-montrilo de la No. 5 maŝino ege balancis, de 2,000 kv. ĝis 12,000 kv. Sciigite pri tio li tuj alkuris por vidi kaj decidis haltigi la maŝinon por riparo. Antaŭ kelkaj tagoj la No. 6 maŝino sonis nenormale. Atente aŭskultinte, li ordonis ĝin haltigi por ekzameno, ke ĝi ne difektu pro malglata funkciado. En kunveno de reprezentantoj de la laboristoj kaj funkciuloj iu laboristo diris, ke ne bone funkcias la klappordo de la cindroellasejo. Kaj li tuj iris por kontroli. La laboristoj kontentige diras: "Kiam ajn estiĝas problemo, la fabrikestro tuj ĝin solvas, kaj solvas prave. Li ofte diras: "La kaldronoj de Ŝihĉingŝan-Elektracentrejo estas el tri generacioj, de avoj ĝis nepoj (ĉar estas novtipaj kaj la plej malnovtipaj), momenta malatento kaŭzis grandan malfeliĉon. Ni ofte ekzamenu kaj riparu, per tio ni ja povas samtempe lerni teknikon!"

La Ŝihĉingŝan-Elektracentrejo estas tute alia ol antaŭe. Per la kuna penado de la partio, registaro, Laborista Sindikato kaj la Novdemokrata Junula Ligo, stariĝis jam administra komitato de la fabriko, en kiu dek laboristoj fariĝis komitatanoj. En la lasta kunveno de reprezentantoj de la laboristoj kaj funkciuloj, la laboristoj faris 128 proponojn, 80% el kiuj estas pri produktado. La laboristoj laboras pli kaj pli energie, ekzemple:

Laboristo Liu Ming-ĉing faris raciigan proponon, kaj rezulte de tio la 'hermeta akvoenlasejo' ekfunkcias aŭtomate por reguligi la akvonivelon, kaj la akvosistemo de la tuta fabriko glate funkcias kaj ne estas plu bezonata malaltprema forno por provizi la mankantan voporakvon. Tio multe malaltigas la produktkoston. Instigite de la modela penado de partiano Tu Kvej-ĉu, la laboristoj en la fanddepartemento de la ripara fabriko plenumis en sep tagoj dekkvintagan laboron fandi 3,750 fornostangojn. Dekokjara Liu Paŭ-juan eklaboris energie de la dua tago post la alveno de fabrikestro Liu, eltorninte 79 rulglobojn. Pli ol duoble grandiĝis la produktkvanto kaj bona estis la kvalito. La 23-a de aprilo estis dimanĉo. Krom la laboristoj kiuj riparis maŝinojn kaj kaldronojn, kelkcent laboristoj memvole faris ekstran laboron por disponi la ekipaĵojn sub libera ĉielo.

Sub la gvido de fabrikestro Liu, la laboristoj de la tuta elektracentrejo laboras kun alta spirito kun jenaj sloganoj; "Observu labordisciplinon!" "Amu la maŝinojn!" "Neniigu akcidentojn!" "Gardu kontraŭ fajro!" "Gardu kontraŭ spionoj!" "Garantiu ke la ĉefurbo ĉiam brile lumas!"

Elĉinigis Venlo Fon.

Kunlaboru Tutmondaj Esperantistoj!

Traduko, represo, resumo kaj ĉiumanieraj utiligoj de materialoj en nia bulteno estas permesataj kaj bonvenataj, kondiĉe ke ili ne estos malice kripligataj kaj la utiliginto plenumos niajn jenajn petojn:

1) Post la traduko, represo, resumo aŭ aliaj utiligoj oni rimarki aparte el kiu numero de nia bulteno ĝi estas tradukita ktp.

2) Sendi al ni 2-4 ekzemplerojn de la traduko, represo aŭ resumo kaj sur ili noti el kiu numero kaj kiu artikolo ĝi estas tradukita ktp.

3) Sciigi al ni kia estas la ĵurnalo aŭ gazeto, sur kiu aperis la traduko, represo, aŭ resumo kaj, se eble, kiom da legantoj ĝi posedas.

Se iu el vi, karaj samideanoj, interesiĝas pri Popola Ĉinio, bone utiligas niajn materialojn kaj volas pli multe informiĝi, sciigu al ni vian bezonon kaj ni volonte vin provizos laŭeble.

"Plej bona propagando estas praktiko". Estas jam tempo por antaŭenpuŝi nian movadon al pli alta stadio ol nur propagandi. Kunlaboru, ĉiuj esperantistoj tra la tutmondo!



Ripari Fervojon — *Huang Jungcan*

ESPERANTO EN ĈINIO

Tikos kaj Giani

Kiel ĉina revolucio iris tra siaj cent jaroj da zigzaga malfacila vojo, tiel same ĉina esperanta movado tra siaj kvindek jaroj da zigzaga malfacila vojo. Ĉar Ĉinio estis duonfeŭda kaj duonkolonia lando, la vastaj popolamasoj, baraktante por sia kompatinda ekzisto sub kruela politika subpremo kaj peza ekonomia ekspluato, eĉ ne havis la eblon lerni legi sian patran lingvon, des malpli lerni la internacian lingvon Esperanto.

La monhava kaj libertemphava reakcia reganta klaso aŭ mem estis plurlingva aŭ povis dungi interpretistojn kaj tradukistojn. Ili ne bezonis Esperanton kaj timis ke la apartigitaj popoloj de la mondo posedas ĉi tiun internacian komprenilon.

Tial en Ĉinio la esperanta movado estis limita en sia malvasta kampo de etburĝaj intelektuloj. Plejparto el ili estis subremata, ekspluatata, rapide malriĉiĝanta kaj ekonomie alproksimiĝanta al la proletaro. Tial ili estis revoluciemaj, revemaj, idealamaj. Rapide ili akceptis Esperanton kaj entuziasme ĝin propagandis.

Kelkaj Esperantaj Eldonaĵoj de 1936 ĝis 1948

Komenco de Esp-a Movado en Ĉinio

En 1906, tuj post la enkonduko de Esperanto en Ĉinion, Liu Sifo fondis Esperantan lernejon. Post du jaroj Lu Sih-kaj fondis la Ŝanhajan Esperantan Lernejon. En 1911, Ŝeng Kuo-ĉeng iniciatis la Ĥinan Esperanto-Asocion, eldonis gazeton 'La Mondo' kaj establis Esperantan Instituton kaj korespondan kurson. En 1913, publikiĝis unufolia kvarta gazeto 'La Ĥina Socialisto'. Tiel fondiĝis la esperanta movado en Ŝanhajo.

En 1908, en Kantono, Hsu Lun-po, reveninte de Liono, Francio, malfermis plurajn kursojn por instrui Esperanton. En 1913, Liu Sifo kune kun Won Kenn, eldonis 'La Voĉo de la Popolo', sed pro persekuto li translokiĝis kun la gazeto al Ŝanhajo kaj laboris ĝis sia morto la sekvantan jaron. Ankaŭ la respondeculoj de 'La Ĥina Socialisto' eskapis al la Malaja Insularo kaj tie disvastigis Esperanton.

Movado Post la 1-a Mondmilito

Esperanta movado revigliĝis en 1920. Hujuez kaj aliaj organizis la Ŝanhajan Esperanto-Asocion, kursojn kaj korespondajn kursojn. Ekde 1923, eldoniĝis la gazeto 'Verda Lumo'. En 1925, fondiĝis biblioteko kaj Ĉina Esperanta Librejo.

En 1921, la Pekina Universitato enmetis Esperanton en sian lernprogramon, kaj invitis Eroŝenkon ĝin instrui. Lernis 5 ĝis 6 cent studentoj. En 1925, establiĝis Pekina Esperanta Kolegio. En 1926, establiĝis Kantona Esperanto-Instituto kaj malfermiĝis sinsekve ok kursoj.

En 1929, en Hankoŭ organiziĝis Esperanto-Asocio, kiu eldonis monatan gazeton 'Espero' kaj fariĝis nova centro en la meza valo de Jangze Rivero. Kiam Japanio invadis Nordorientan Ĉinion en 1931, ĝi kune kun alilokaj esperantaj organizoj publikis deklaracion por sciigi la mondon pri la krimo de japana imperialismo. Tiam ekburĝonis la kombino de la esperanta movado kun la naciliberiga movado en Ĉinio. Tiam la progresemaj ĉinaj esperantistoj, influate de la Ĉina Komunista Partio, komencis akcepti la marksismajn mondkoncepton kaj lingvoteorion.

Post la Japana Okupado de la Nordoriento

En la 'Evento de 28, Januaro', 1932, la japana invado al Ŝanhajo kaj la rezistmilito de la 19a-voja Armeo, la longhistoria Ŝanhaja Esperanto-Asocio detruiĝis de kanonfajro. Tamen aliloke plivigliĝis Esperanta movado, kuniĝante kun la popolamasa naciliberiga movado. Ankaŭ en Ŝanhajo organiziĝis subtera ĈPEU (Ĉina Proleta Esperantista Unio) kaj publikigis PEK-Bultenon. En Pekino estis gazeto nomata 'Radio'. Iliaj materialoj estis tradukitaj kaj publikitaj en "L' Humanité" en Francio, revolucia ĵurnalo en Germanio kaj disversaj lokaj ĵurnaloj en Sovetio. Somere en 1932, en Hankoŭ estiĝis simila organizo. En Pekino kaj Kunming ankaŭ stariĝis novaj organizoj. En Ŝanhajo aperis nova Korresponda Lernejo. Decembre eldoniĝis monata gazeto 'La Mondo'. En la sekvanta januaro publike fondiĝis Ŝanhaja Esperantista Ligo sub la gvido de ĈPEU. Ĝi forĵetis la neŭtralismon ĝenerale akceptitan en la pasinteco. Kiam la internacia laborista esperanto-movado apartiĝis de la burĝa movado, ĝi firme staris en la flanko de la Proleta Esperantista Internacio. Ĝi antaŭenpuŝis la esperantan movadon per nova vidpunkto, nova labormetodo kaj nova entuziasmo, kaj akiris subtenon de diverslokaj kamaradoj. Per 'La Mondo' kiel organizilo, Ŝanhajo fariĝis la centro de tutĉinia esperanta movado.

Disvolviĝis la movado de Proleta Esperanto-Korespondanto kaj kolektiva korespondado. La antaŭe subtera PEK-Bulteno en Ŝanhajo nun fariĝis presita 'Ĉinio Hurlas'.

Sur la frontpaĝo de 'La Mondo' estis la slogano: "Per Esperanto por la liberigo de Ĉinio." Tia kuniĝo de teorio kaj praktiko havis bonan influon al la mastrado de la batalilo Esperanto. Malgraŭ la peza subpremado de la reakcia regado, esperanta movado en diversaj lokoj zigzage antaŭenpuŝiĝis.

Dum la Kontraŭ-Japana Milito

En la jaro 1937, Pekino kaj Ŝanhajo sinsekve falis en la manojn de la japanaj invadantoj. Haltis la aktivoj de la Ŝanhaja Esperantista Ligo. Plejmulto de la membroj partoprenis kontraŭinvadan laboron en la interna Ĉinio kaj la postfrontoj de la malamikoj. Jen nova komenciĝo de esperanta laboro.

Eldoniĝis tri gazetoj por informi pri la ĉina kontraŭjapana milito. La unua estis 'Voĉoj el Oriento', kiu eldoniĝis en Hankoŭ en marto, 1938 kaj translokiĝis al Hongkong en septembro. La dua, 'Orienta Kuriero' ankaŭ eldoniĝis en Hongkong. La tria, 'Heroldo de Ĉinio', eldonita en Ĉungking, estis duonmonata. La eksterlandaj legantoj plej interesiĝis en la novaĵoj kaj artikoloj pri la Okavoja Armeo, la kerno de la nuna Popola Liberiga Armeo. La gazetojn subtenis precipe la laboristo-esperantistoj diverslandaj. En 11 landoj stariĝis agentoj por 'Voĉoj el Oriento'. Nederlandaj esperantistoj okazigis ekspozicion de la Ĉina Rezistmilito per fotoj senditaj de ĝi, por helpi la ĉinajn militsuferantajn infanojn. La legantoj de 'Heroldo de Ĉinio' disvastiĝis en pli ol 850 urboj en 63 landoj.

En Ĉungking ankaŭ establiĝis Koresponda Esperanto-Lernejo. Ĝi eldonis multobligitan gazeton 'Ĉina Esperantisto' por enlanda disvastigo. La du aŭ tri respondeculoj persistis sur sia posteno per sia hardita spirito kontraŭ malsato kaj malvarmo fizikaj, kontraŭ minaco kaj persekuto politikaj, tra pli ol ses longaj malfacilaj jaroj. Ĝi varbis pli ol du mil lernantoj.

Krom gazetoj ankaŭ eldoniĝis broŝuroj. Inter ili estis la jenaj: 'Tanaka Memorando', 'Elektitaj Noveloj de Lu Sin', 'Nova Tasko' (elektitaj rezistmilitaj noveloj), 900-paĝa 'Plena Vortaro Esperanta-Ĉina,' 'Patrineto', 'Transformiĝo' (ambaŭ rezistmilita literaturo) kaj "Flustr' el Uragano" (verko de japana kontraŭimperiisma esperantistino Verda Majo).

Enkonduko de Monda Literaturo en Ĉinion

En la flanko de traduko el Esperanto, estas menciinda la jeno 'La Songo de Makaro' de Korolenko, 'La Kapitanfilino' kaj 'Eŭgeno Onegion' de Puŝkin, kaj "Portreto' de N. V. Gogol, el Cara Rusio. 'La Morto de Danton' de A. N. Tolstoy, 'Kiel Mi Lernis' de M. Gorkij kaj 'La Submarinistoj' de Priboj, el Sovetio. 'Viktimoj', 'Printempo en la Aŭtuno' kaj 'Nur Unu Homo' de Baghy, kaj 'Johano la Brava' de Petöfi, el Hungario. 'Marta' de Orzesko, 'Noveloj' kaj 'Janko-Muzikanto' de Sienkiewicz, kaj 'La Fundo de l'Mizero' de V. Sieroŝevski, el Polio. 'Bulgaraj Rakontoj' de I. M. Vazov, 'Unu Angulo de l'Animo' de G. P. Stamatov kaj 'Himno' de M. Fjubin, el Bulgario. 'Svisaj Rakontoj' de E. Zahn, el Svisio. 'Abismoj' de T. Forge kaj 'La Blankĉevala Rajdanto' de T. Storm, el Germanio. 'Gimnazio' de hebrea verkisto Ŝ. Alejĥem.

Esp-a Movado en Nova Ĉinio

Post la venko de la Kontraŭ-japana milito, pli intensiĝis la politika subpremo de la reakciularo. La esperanta movado povis apenaŭ ekzisti. Nur kiam la Popola Liberiga Armeo venke transpasis la Jangze-Riveron kaj liberiĝis Ŝanhajo, liberiĝis ankaŭ la esperanta movado. Je la 7-a de aŭgusto, 1949, refunkciiĝis la Ŝanhaja Esperantista Ligo. Ĝi proklamis, ke ĝi batalas por la unuiĝo de pacaj kaj demokrataj fortoj en la tuta mondo kaj la konstruo de novdemokrata Ĉinio, ke la enhavo de Esperanto devas esti internaciismo, kaj ke Esperanto devas esti uzita por kunfluiĝo de kulturo kaj interŝanĝo de sperto en produktado kaj batalado.

Ili jam malfermis tri radio-kursojn kaj ses kursojn diversloke. Ĝi ankaŭ organizis memlernajn grupojn. Ĝia organo 'Popola Mondo' eldoniĝis ekde januaro. Ĉe la Popola Radio-Stacio ĝi havas brodkastan programon por disvastigi Esperanton.

En Pekino, Tienzin, Kantono, Sian, Tajjuan, Ĉungking kaj aliloke, ĉie komenciĝis esperanta movado. Tamen dum la liberigo de Ĉengtu, en la masakro de progresemuloj fare de la Kuomintang la ĉina esperanta movado perdis sian esperplenan karan kamaradon Eltunko, kiu estis unu el la plej persistaj revoluciaj esperantistoj sub la reakcia regado.

La Ĉina esperanta movado, efektive, ege postlasiĝis ol tio de Eŭropo. Tamen post la ĝisfunda liberiĝo de la popolamasoj de la tuta lando, post la kuraco de iliaj vundoj fare de la reakciaj banditoj, post la altigo de ilia kultura kaj politika nivelo, tiam Esperanto en Ĉinio sendube havos senprecidentan vastan disvolviĝon.

En la Komuna Programo de la Politika Konsultiĝa Konferenco de la Ĉina Popolo estas skribita: "Subteni la internacian daŭran pacon kaj la amikan kunlaboron inter la popoloj de diversaj landoj. Por tion efektivigi, la bezono de komuna internacia helpa lingvo estos akre sentata. Pro la granda diferenco inter la ĉina kaj la okcidentaj lingvoj, nur Esperanto, lingvo simpla kaj racia, devenanta el la Okcidento kaj facilakceptebla de la Oriento, taŭgas por lingva ponto inter la popolamasoj de diversaj landoj. Tio malfermos novan paĝon por la Ĉina Esperanta movado.

TRI SENRIVALAJ BRAVULOJ

— LIU BE-JU —

La verkinto naskiĝis en Pekino en la jaro 1915. Dum sia junaĝo li iam vizitadis lernejon, servis kiel komizo en butiko kaj aliĝis al malnova armeo kiel lernanto-soldato. Li komencis verki en 1935. Dum la kontraŭjapana milito li alvenis al Jenan, la koro de la rezist-militanta Ĉinio, dufoje vizitis kontraŭjapanajn bazojn en la postfronto de la malamiko, kaj verkis "La Vivo de Generalo Ĉu Teh" (ankoraŭ ne publikita), publikis kolektojn de noveloj "Ĉe Utaj-Monto", "La Suno" kaj "Feliĉo". Post la venko de la rezistmilito li vizitis la tutan Nordorientan Ĉinion kiel raportisto de la Novĉinia Novaĵ-agentejo, iris al la fronto kun la Liberiga Armeo, kaj publikis kolektojn de raportoj "Rondiro en Nordorienta Ĉinio," "Rakontoj pri Herooj", "Epokaj Impresoj", "Historia Uragano" kaj kolekto de noveloj "Disflugas Militfajro." En 1949 li transiris la Jangze-Riveron kun la trupo de Generalo Lin Piaŭ, verkis mezlongan novelon "Fajrlumo en la Fronto" kaj partoprenis en la Unua Plena Sesio de la Politika Konsiliĝa Konferenco de la Ĉina Popolo. En 1950 li finis la literaturan kinodramon "Granda Batalo".

1. Kiel Naskiĝis la Malunueco.

Iuj imagas nin soldatojn tro simplaj.

Laŭ ili, ni nur jen batalas, jen dormas. Tamen a fakto estas tute alia.

La kompanio estas al ni kiel hejmo. La sola diferenco konsistas en tio, ke tiu hejmo troviĝas jen en tranĉeo jen sur la fojnamaso de iu kamparano. Ĉiu hejmo havas sian harmonian vivon, sed ankaŭ siajn implikaĵojn.

Lasu la ceterajn, ni nur babilu iom pri nia grupo.

Antaŭ nelonge, io okazis tiel. Ni bonvenigis batalanton, kiu returnis al la trupo. Ĉu ne ĝojiga afero? Tamen el tio rezultis malunueco.

Batalheroon ni bonvenigis, kiu ankoraŭ ne plene resaniĝis kaj returnis al la fronto. Ni opiniis: tiu estas vere bonveniginda batalanto. Vespere la tuta grupo sidis kune sur terlito. Survoje li ĉiam timis, ke li ne kuratingus la trupon ĝustatempe. Nun lin ĉirkaŭis la kamaradoj. Ĉu necesas mencii lian ĝojon? Li rakontis senlace kun multaj gestoj, kiel li venis per fervojo, kaj kiel li helpis la suprenturniĝintajn[1] kamparanojn en la batalo kontraŭ la terposedantoj. Lia rakonto plurfoje incitis la aŭskultantojn al ridego. Kaj ni ankaŭ rakontis alterne tion kaj ĉi tion pri nia kompanio. Fine, iu kamarado diris: "Kiam vi forestis, ni ĉiam vin sopiris. Kaj dum tiuj tagoj viaj heroaj agoj estis disvastigitaj kaj rakontataj tra la tuta regimento. Vi fariĝas famulo. La regimentestro alvokis, ke oni vin imitu kaj nomis vin sentima heroo."

Ambaŭflanke estis tre gaje. Neatendite iu batalanto interrompis. Li diris ne pli ol unu vorton. Sed el tio malunueco jam naskiĝis.

2. Jan Ĉengfu

La ĉefa rolulo de la historieto estis Jan Ĉengfu, la supremenciita batalheroo.

Lian devenon ni tiam ne klare sciis. Sed oni povis konstati je la unua rigardo, ke li estis malriĉulo en la pasinteco. Ordinare en la grupo li montriĝis sentime malcedema, kaj nekredebla kuraĝulo sur la batalkampo.

Ĉifoje li vundiĝis en batalo kaj enuiĝis pro la longa kuŝado en la hospitalo. Do li hejmeniris por iom koniĝi pri la stato de la suprenturniĝo. Vestoj sur korpo, ĉevaloj en stalo kaj kulturita tero antaŭ la pordo. Li sentis neeldireblan ĝojon. Vespere iu grupo de la kamparana unuiĝo bonvenigis tiun batalanton, kiu revenis de la fronto. Li diris sen ĉirkaŭparolo: "Mi diras al vi, ke vi konfidu: oni batalas bone kaj ni venkos sendube. Nun mi revenas kaj vidas, ke vi ankaŭ luktas senkompromise kontraŭ la feŭdalismo. Mi konfidas je vi. Nur bone persistu! Sur la fronto mi ne malhonoros nian hejmvilaĝon."

Li forlasis antaŭ tagiĝo. Returninte al la hospitalo, li vizitis la enlitajn batalantojn unu post alia, kaj poste tuj revenis al la fronto.

Kiam li forestis, ĉiu propagandis pri lia heroeco, de buŝo al buŝo, kaj ĉiam pli disvastigite ĝi fariĝis kvazaŭ fabelo. Verdire, estis ja rakontinde.

Iutage ni renkontis la malamikojn survoje. Li kuratakis unusola kaj tuj perdis kontakton kun la trupo. La malamikaj maŝinpafiloj kaj 60-kanonoj faris tian muĝadon kaj maron de fumo kaj fairo. Diable! Ni divenis, ke Jan Ĉengfu jam plenumis sian parton en la revolucio—ĉio estas finita. La kompaniestro preskaŭ krevis de kolero. Kun du elstarantaj ruĝaj okuloj li mem gvidis la ŝturmon de la trupo. Nu, divenu, kio sekvis? En la plej kriza momento io okazis meze de la malamikoj. Ili ekŝanceliĝis kaj ni trabreĉis ilian baron. Ĉar, kiam Jan Ĉengfu palpis antaŭen blinde, oni ne scias kiel li hazarde trafis la provizoran komandejon de la malamikoj. Li ĵetis al ĝi grenadon dum nia kuratako. Kompreneble la malamikoj konfuziĝis. Nun li returnis pelante antaŭ si per pafilo korpulentan kaptiton, kiu laŭ aserto estis ja regimentranga oficiro. Li laŭte kriis, ke estis tiu ulo kiu direktis la trupon. Post la okupado de la malamika pozicio, ni pli profunde antaŭen etendiĝis. Kaj Jan Ĉengfu tuj returnis kriante: "Jen mi revenas." Aŭdante tion ĉiuj pleniĝis de entuziasmo. Refoje estis nia grupo kiu alprenis la devon de kuratako. La cirkonstanco estis vere streĉa. Nelonge poste li vundiĝis kaj svenis senkonscie. La kompaniestro ordonis, ke ni portu lin for de la fajrolinio kaj transdonu al la brankardistoj en la tiea arbaro.

3. Laŭ Jutiaŭ[2]

Laŭ Jutjiaŭ estis la ŝerenomo, kiun oni donis al Li Faho. Lin ĉiam tiel nomante ni kvazaŭ forgesis lian veran nomon, eĉ la politika direktoro de la kompanio kelkfoje nomis lin tiel kun intimeco.

Laŭ Jutijaŭ estis veterana batalanto. Iuj ankaŭ nomis lin Ĉiampostrestulo. Sed li ne tre atentis pri tio.

Li soldatiĝis tuj post la '15a de Aŭgusto'[3], tamen multaj el liaj kunuloj jam promociiĝis al petolonaj oficiroj, dum li ankoraŭ restis simpla soldato. Li diris: "Tiuokaze mi restas pli libera kaj senzorga."

Li estis liberalisma kaj prenis ĉion malserioze. Gravajn disciplinojn li ne rompis sed malgravajn rompis senĉese. Jam tri aŭ kvar jaroj pasis post lia soldatiĝo. Li trairis ĉirkaŭ cent batalojn, sed eĉ hareto neniam rompiĝis. Kompreneble li havis sian superan atuton. En kriza momento li estis rimedoplena. Li agis vigle, batis peze kaj trafe. Tamen en politika lernado li neniom progresis kaj vivis sen disciplino. Eĉ unu medalo ne falis sur lin.

Nun, ni revenu al la rakonto. Tiuvespere, kiam ni bonvenigis Jan Ĉengfu, estis li, kiu surprize diris ion malplaĉan. Komence li fumadis apude tute ne zorgante pri ni. Kiam oni tiom laŭdis Jan Ĉengfu, li puŝis flanken la aliajn kaj alklinis sian kapon dirante:

"Mi opinias, ke la hero-medalo nur hazarde trafis vin."

Aŭdinte tion, Jan Ĉengfu krevis de kolero kaj demandis kun minaca mieno: "Diru, kiel hazarde?"

Laŭ Jutiaŭ rigardis lin trankvile kaj respondis malrapide:

"Pli ol cent batalojn, grandajn kaj malgrandajn mi trairis, kaj sur la korpo ne troviĝas eĉ unu kugla truo. Jen estas vera majstreco. Heroo vi ja estas, sed viaj manovroj sur la batalkampo estas ankoraŭ ne tre kompetentaj."

Tiel kvazaŭ superverŝite per pelvo da malvarma akvo malgajiĝis ĉiuj ĉeestantoj. La grupestro diris, ke estas jam malfrue, oni estingu la lampon kaj dormu.

De post tiam Jan Ĉengfu kaj Laŭ Jutiaŭ ne parolis unu al la alia.

4. Ĉaŭ Siaŭji

Se la implikaĵo disvolviĝus nur inter Jan Ĉengfu kaj Laŭ Jutiaŭ, la afero estus ja pli simpla. Jen subite enmiksiĝis Ĉaŭ Siaŭji.

Ĉaŭ Siaŭji estis konvertita militkaptito, nur deknaŭjara. Li estis liberigita dum la somera ofensivo. Oni opiniis, ke li estas ankoraŭ tre juna kaj lia menso ne serioze venenita. Tial oni ne sendis lin al la postfronto kaj tuj akceptis en la trupon. Ekstere li estis vigla kaj simplanima, sed sekrete ruzplena. Dum diskutado li neniam parolis. Li ĉiam atrigardis flankestare kaj pensis: tiu aŭ ĉi tiu nepre vundiĝos el la du luktantaj tigroj. Mi aliros al tiu, kiu venkos. En la kompanio li firme alkroĉiĝis al la principo: estu nek fervora nek postrestanta. Li estis ĉikanema. Se okazis bagatelo, li tuj grumblis: "Bontrakto? Ĉio estas mensogo." Nun ilia estis la modela grupo. Krome la grupestro preteratentis nenion. Tamen eĉ roko havas fendeton. Iom post iom la liberalisma percepto inklinigis lin al Laŭ Jutiaŭ. Tiuvespere Laŭ Jutiaŭ malpacis kun Jan Ĉengfu. Li sekrete simpatiis kun Laŭ Jutiaŭ. Kiam Jan Ĉengfu parolis pri suprenturniĝo de kamparanoj, faligo de terposedantoj, herooj, ktp., li jam malkontentis. La sekvintan tagon li montris amikecon al Laŭ Jutiaŭ. Tamen Laŭ Jutiaŭ havis ankaŭ sian principon: fumi unu aŭ du pipojn da tabako kun Malgranda Ĉaŭ estas ja negrave, sed interparoli kun li intimece estus troa humiliĝo. Li pensis: "Mi venis el Ŝanhajkvan[4] kaj vi estas nur militkaptito." Malgranda Ĉaŭ ne trovis konsolon ĉe li, do turniĝis al Jan Ĉengfu kaj komunikis al li por lin inciti, ke Laŭ Jutiaŭ diris: "Kio estas Jan Ĉengfu! Ĉion oni vidus kiam okazos la venonta batalo."

Jan Han

Kiam li parolis koncernante lin men, Jan Ĉengfu kompreneble aŭskultis atente, kaj li interrilatis kun Laŭ Jutiaŭ pli malbone ol antaŭe, kaj tuj sin forturnis vidante lin.

Tamen, kiam Malgranda Ĉaŭ parolis pri sia afero, Jan Ĉengfu jam ne atentis. Kial?

Li pensis: Mi estas suprenturniĝinta batalanto el liberigita regiono dum vi estas militkaptito el regiono kontrolita de Ĉiang Kaj-ŝek. Tiu sento de supereco forte frapis Malgrandan Ĉaŭ. De post tiam la entuziasmo de Malgranda Ĉaŭ multe malleviĝis.

Tiamaniere, post kvar aŭ kvin tagoj la modela grupo fariĝis tute ne modela.

5. Vanaj Klopodoj de la Grupestro

La disvolviĝo de la implikaĵo forte maltrankviligis Li Ĉanhu, la grupestro. Li propramane kreis la modelan grupon kaj nun vidis, ke ĝi disfalas. Kiel povus li ne maltrankviliĝi?

Li estis bona grupestro. Ĉian malfacilaĵon en la grupo li prenis unue sur sin. Oni devas kompreni, ke ne estas facila tasko gvidi grupon. Ĉiu el la dek homoj havas sian intereson. Oni indas la nomon de gvidanto nur kiam li sukcesis fari la dek korojn en unu. Li Ĉanhu neniam monstris sin antaŭ la batalantoj kun pufanta barbo kaj elstarantaj okuloj.[5] Li estis malnova batalanto el Ŝanhajkvan, kaj vere admirinda pro lia pacienco en

persvado kaj edukado. Sed post la naskiĝo de malnuneco multe da malfacilaĵoj leviĝis dum marŝado aŭ batalo. La tri homoj ne interparolis. Se li aranĝis, ke ili deĵoru sinsekve unu post alia, ili ne transdonis la laboron oficiale. Se li ordonis, ke ili manĝu kune, nu, se Jan Ĉengfu sidis vizaĝe al oriento, tiam Li Faho al okcidento, ĉiam dorso kontraŭ dorso. Se li dormigis ilin sur sama terlitoˆ, kiam Li Faho kuŝis tie, Jan Ĉengfu ekprenis sian pakaĵon kun grunto kaj kuŝiĝis surtere.

Iun tagon, Li Ĉanhu parolis kun ili laŭvice. Komencе kun Jan Ĉengfu. Post longa klarigo, Jan Ĉengfu diris simple:

"Mi servas la popolon, sed humiliĝos antaŭ neniu. Taŭga aŭ sentaŭga, ĉio vidiĝos sur la batalkampo." Li ekstaris kaj foriris.

Tiam li parolis kun Li Faho. Li aŭskultis fumante. Kiam la grupestro finparolis, li respondis:

"Mi servos la popolon ĝisfine. Por mi estas tutegale."

La grupestro reprovis kun Ĉaŭ Siaŭji. Ĉaŭ diris fine: "Grupestro, antaŭe mi ne komprenis. Post liberigo, mi ricevis edukon. Nun mi servas al la popolo. Kion alian mi aldonu?"

Finfine ĉiuj tri ja servis la popolon. Lia tuta stoko da entuziasmo havigis al li nur samkvanton da doloro. Li diris al si: "La tri uloj kvazaŭ interkonsentiĝis!" Li staris tute senkonsile kaj povis nek plori nek ridi.

Ĝuste en tiu tempo la regimento instigis la batalantojn komenci plendmovadon.[6] En kelkaj fratkompanioj ĝi jam disvolviĝis. Ĉiuj ploregis kaj kriis dum plendado. Antaŭe la kvina grupo estis modelo de solidareco. La politika direktoro elektis ĝin kiel sian eksperimentan grupon kaj intencis ekirigi la movadon en kelkaj tagoj. Kiam pli ĝisfunde li konis ĝin, li kapneis malespere. Li Ĉanhu apenaŭ povis subpremi sian larmon. Li kaptis la manon de la direktoro, dirante: "Direktoro, la kvina grupo ankoraŭ havas esperon. Bonvolu doni al mi tri tagojn por ankoraŭfoja provo."

Ricevinte la datlimon, li cerbumis: "Kiel komenci?" Li planis 'ĉirkaŭatakon' kun decidemo. Li kunvokis ĉiujn tri kaj per malmultaj vortoj malkovris ilian malnuecon. Neatendite ili respondis unuvoĉe: "Nenio okazis inter ni, grupestro." Li Ĉanhu ne povis reteni sin de rido. Do li iom parolis kun ili pri ilia partopreno en la konkurado pri la modeleco. Unu tago pasis, sed ilia sinteno restis same kiel hieraŭ. Ĉiu ignoris la alian. La grupestro senkonsiliĝis. Post la dorso de la tuta grupo, li dolore ploris. La sekvintan tagon, batalo rekomenciĝis. Ĉiu okupis sin pri la batalpreparado, kaj tempo pasis nerimarkite. Tamen, pri ilia interrilato montriĝis nenia progreso.

6. Peco da Osto

Batalo okazis en la tria tago. Pluvis. Post batalo, Li Ĉanhu forlasis la kampon kun la tuta grupo. Pasante publikan enterigejon li rimarkis pecon da osto surtere.

Haltante li kliniĝis kaj levis ĝin. La kamaradoj rigardis al li kun miro. Li proponis al ili demandon:

"Laŭ via opinio, kies osto ĝi estas?"

Ili interdiskutis sub la pluvo. Iuj asertis, ke ĝi estas la osto de malriĉulo kaj aliaj diris la malon. Fine Li Ĉanhu parolis:

"Laŭ mi, ĝi apartenis al malriĉulo. Terposedantoj, bonhavaj terkulturistoj kaj riĉuloj, ĉiuj havas siajn ĉerkojn kaj tombojn. Iliaj ostoj ne povas esti disĵetitaj tie ĉi. Nur la malriĉuloj, kiuj ne havas mangaĵon dumvive kaj tombon post la morto, kuŝas senŝirmaj en vento kaj pluvo. La ostoj restas dise mise sur la kampo kaj neniu zorgas pri ili."

Returninte al la bivakejo, la batalantoj okupis sin je sternado de pajlo sur la terlito kaj akvoboligo. Li Ĉanhu rimarkis, ke nur Jan Ĉengfu, Li Faho kaj Ĉaŭ Siaŭji forestas. Ili ne aperis dum la mangotempo. Li kuris en la ĉambron. Tie Malgranda Ĉaŭ kuŝiĝis tuj post reveno kaj ne leviĝis. La grupestro suspektis, ke li ree malpaĉis kun Laŭ Jutiaŭ kaj Jan Ĉengfu, do lin konsolis:

"Aj, Malgranda Ĉaŭ, homoj ja estas tiaj strangaĵoj. Oni ĉiam trovas kaŭzon por grumbli kontraŭ la aliaj dum kunvivado, sed ĉiam sopiras tro malfrue unu al alia post disiĝo. Nu leviĝu!"

Li klinis sin super la terliton kaj skuis lian ŝultron. Je lia surprizo, Malgranda Ĉaŭ turnis sin kaj premiĝis al lia brusto ploregante.

Post momento Malgranda Ĉaŭ ĉesis plori kaj rakontis al li historieton, kiu tuŝis lin tiel, ke ambaŭ la aŭskultanto kaj la rakontanto ploris kune.

La grupestro iris tuj al la kompanio kaj raportis ĉion al la direktoro. Ankaŭ la direktoro estis forte tuŝita kaj ordonis lin bone zorgu pri Malgranda Ĉaŭ. Survoje li aĉetis kelkajn ovojn per sia propra mono kaj portis al Malgranda Ĉaŭ. Sed Malgranda Ĉaŭ reploris singulte ekmangante la ovojn.

Kion ja rakontis Malgranda Ĉaŭ kaj aŭdis la grupestro? Ankoraŭ ne estas tempo ĝin malkaŝi. Ni haltu ĉi tie provizore. *(Daŭrigota)*

Trad. S. J. Zee

---

(1) Suprenturniĝi: Populara esprimo por 'liberiĝi'.

(2) Laŭ Jutiaŭ: 'Laŭ' signifas 'maljuna' aŭ 'malnova'. 'Jutiaŭ' estas longforma farunaĵo fritita en oleo. 'Laŭ jutiaŭ' signifas malnova jutiaŭ kiu estas elasta kaj nefacilerompebla. Kiel moknomo, ĝi signifas neprogresemulon kiu inerte persistas en sia rutino, kontentas je sia pasinta atingo kaj estas sensenta al konsilo, kritiko aŭ kuraĝigo.

(3) '15-a de Aŭgusto' en 1945 estis la dato de liberigo de Manĉurio el sub la okupado de Japanio, helpe de Sovetio.

(4) el Ŝanhajkvan: Ŝanhajkvan estas pasejo inter Nordĉinio kaj Manĉurio. 'El Ŝanhajkvan' signifas 'el la sudo de Ŝanhajkvan', 'el la malnova liberigita regiono'.

(5) Kun pufanta barbo kaj elstarantaj okuloj: furioza.

(6) Plendmovado: movado por plendi kontraŭ siaj subpremintoj kaj ekspluatintoj ke la batalantoj klase konsciiĝu.

Rimarkoj de la tradukinto

LA OKULOJ DE BLINDULOJ MALFERMITAJ

— Popolkleriga Kampanjo en Porto-Arturo kaj Dajren —

Ĉeng Lien-tŭan

Blindulo kun Okuloj

La kondiĉoj de la prunto ŝajnis kontentigaj, tial kamparano Vang Te-caj senhezite ekprenis la plumon kaj desegnis sur la kontrakto grandan krucon kiel subskribon. Unu jaron poste, la bienulo-kreditoro venis al li kaj postulis ke li translokiĝu el sia domo. "Ĉu la templimo ne estis du jaroj? Ĉu vi ne diris al mi kaj mia edzino..." argumentis la konsternita vilaĝano. "Estas klare skribite en la kontrakto ke vi redonos al mi la monon en unu jaro, alie vi transdonos al mi vian domon kiel repagon," abrupte lin interrompis la procentegisto. Kaj la familio de Vang estis elpelita.

Ĉi-supran doloran sperton rakontis kamparano Vang ĉe l' vilaĝa plendo-kunveno speciale aranĝita por rememori la pasintajn suferojn kaŭze de analfabeteco. Vang aldonis: "Kamaradoj, vi bone scias ke mi estas analfebeto. Kvankam mi havis okulojn, mi estis tiel trompita kiel blindulo. Nun mi estas malfermonta miajn okulojn. Mi jam decidis lerni legi kaj skribi."

Kampanjo Kontraŭ Analfabeteco

El la 900,000 loĝantoj en la Regiono Porto-Arturo kaj Dajren, kie vivas kamparano Vang, 370,000 estis analfabetoj je la tempo de japana kapitulaco. Tuj post kiam ili estis liberigitaj de la imperialisma kaj feŭdalisma subpremo, tiuj 'blinduloj' akiris ŝancon lerni legi kaj skribi. Je la fino de 1948, la nombro de analfabetoj jam malkreskis ĝis 283,427. Je la fino de 1949, 246,093 el la analfabetoj jam lernis 500 ĝis 600 ideografojn. Kaj laŭ la plano, kiu estas vigle efektivigata, analfabeteco estos absolute neniigita je la fino de 1950 en ĉi-tiu 2,399 kvadrat-kilometra regiono de Porto-Arturo kaj Dajren.

Klerig-Kampanja Komitato de Porto-Arturo kaj Dajren estis starigita en marto de 1949, kun filiaj komitatoj kaj subfilioj en ĉiuj urboj kaj diversaj distriktoj. Depost tiam, 1,536 klerigaj kursoj estis organizitaj kaj 1,176 klerigaj lernejoj fonditaj. Krome, la komitato ankaŭ starigis 322 kulturajn centrojn, 92 kulturajn klubojn kaj ok kulturajn salonojn. Entute 246,093 analfabetoj partoprenis en libertempa lernado. La kampanjo estas ĉie eksterordinare sukcesa sed en Liĉiakoŭ, kiu gajnis por tri sinsekvaj sezonoj la titolon de 'modela vilaĝo en lernado,' la movado havas precipe rimarkindan atingon.

Modela Vilaĝo en Lernado

Liĉiakoŭ situas ne malproksime de Porto-Arturo. La vilaĝo enhavas 77 familiojn kaj 465 loĝantojn, el kiuj estis 115 analfabetoj, 34 viraj kaj 81 inaj, antaŭ la 1949 kleriga kampanjo.

En la komenco, la kamparanoj ne emis partopreni en la kleriga movado. Kelkaj havis praktikajn malfacilaĵojn; ekzemple, la dommastrinoj ĝenerale sinokupis pri siaj infanoj kaj mastrumado. Sed kelkaj nur ne havis intereson en lernado, ĉar ili pensis, ke ili povas egale vivi kiel antaŭe nesciante legi kaj skribi. Aliaj sentis ke por iliaj cerboj la ĉinaj ideografoj estas tro komplikaj.

La kadroj de Liĉiakoŭ ne estis spertaj en ĉi tia laboro. Avidaj je bona rekordo en la kampanjo ili uzis ordonon anstataŭ persvado. La vilaĝestro gluis surmure anoncon, ordonante ke la kamparanoj aliĝu al la klerigaj kursoj kaj por ĉiufoja foresto oni pagu 1 ĝinon da milio kiel punon. Ĉirkaŭ 40 kamparanoj komencis ĉeesti la kurson duonvole. La aliaj preferis pagi la punmonon.

Kiam Vang Sien-tang, sekretario de la Liĉiakoŭfilio de l'Komunista Partio, rimarkis ke io estas erara en la laboro, li rondiris, demandante la opiniojn de la vilaĝanoj, kaj intertempe studis zorgeme kun siaj kamaradoj la instrukciojn de la Partio kaj registaro. Fine ili komprenis ke la malfacilaĵo estis kaŭzita de nesufiĉa mobilizo.

Sekve la klerigaj kursoj estis provizore ĉesigitaj kaj kunvenoj por rakonti pasintajn dolorojn pro analfabeteco kunvokitaj. Ju pli la kamparanoj rakontis pri siaj malfeliĉaj spertoj, des pli ili komprenis kiel malutila estis analfabeteco por ili. Tiam diskutoj por rekomenci la klerigan movadon estis aranĝitaj tra la vilaĝo.

Kiam la vilaĝanoj estis pretaj kunlabori, ĉiaj problemoj fariĝis solveblaj, kelkaj maljunuloj memvole proponis prizorgi la infanojn de siaj najbaroj dum la lerno-horoj. Multaj edzoj volonte prenis sur sin parton de la hejmaj bagatelo j. Sekve preskaŭ ĉiuj virinoj povis iri al la klerigaj kursoj escepte 19 virinoj, por kiuj, pro ilia neebleco garantii regulan ĉeeston, speciale hejm-studa grupo estis organizita.

La problemo de regula ĉeesto ĉe la vira flanko estis multe pli simpla. Konvinkite ke ili havas same la kapablon legi kaj skribi, ĉiuj viroj aliĝis al la kursoj.

Eĉ kriplulo decidis lerni, kiam liaj najbaroj proponis porti lin al kaj de la lernejo ĉiuvespere.

Tiamaniere Liĉiakoŭ sin ĵetis en ardan klerigan kampanjon. Laborante sur la kampo, la kamparanoj ĉiam sin ekzercis aŭ instruis unu al la alia la ĵus lernitajn ideografojn. Anstataŭ la kutima salutfrazo "Ĉu vi jam manĝis?" oni salutis survoje per "Kiel iras via lernado?"

(Daŭrigota sur p. 4)

ABONMANIERO

1 Senpagan specimenon ni sendos al ĉiu, kiu letere postulos. Se iu volas daŭre ricevadi nian gazeton volu pagi laŭ la tarifo.

2 Kun ĉiuj esp-eldonejoj kaj esp-ĝazetoj ni volonte interŝangos reciproke periodaĵojn aŭ librojn.

3 Respond-kuponon ni ankaŭ akceptos kondiĉe ke inter tiu lando kaj Popola Ĉinio stariĝas jam diplomatia rilato.

Abontarifo

Por legantoj en	Prezo de 6 numeroj	Prezo de 12 numeroj
U. S. S. R. kaj Orienta Eŭropo	3 rubloj	6 rubloj
Britio	3 ŝilingoj	6 ŝilingoj
Sudmaraj Insuloj kaj Hongkong	HK $ 3.00	HK $ 6.00
Usono kaj Kanado	US $ 0.65	US $ 1.25

Rim. 1 Sendkoston inklazive, rekomendon eksklazive.
2 Legantoj en ceteraj landoj povas aboni laŭ prezo por Usono.

國內定價：每期基價一元五角全年12期基價十八元郵費在內

北京軍事管制委員會臨時登記證新字第一二〇號 ★ 經北京郵政管理局認爲第一類新聞紙類登記執照第三十六號